



ESPERANTO

APRILIO 1962

55a Jaro - N-ro 677 (4)

esperanto

APRILLO 1962

55 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 677 - (4)

Fondinto: H. HODLER

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro: W Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Te'efono: (010) 32788. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1962): 11.50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld. 1/2 paĝo 64,— gld. 1/4 paĝo 32,— gld. 1/8 paĝo 16,— gld. 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado:

0.15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en pli ol 80 landoj.

Estraro de U.E.A.:

H. W. Holmes. O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3. (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

FRONTPAĜA BILDO:

Dum la nacia festo pri sendependiĝo de Brazilo ankaŭ la esperantistoj partoprenis la marŝadon. Gelernantoj el lernejoj, en kiuj oni instruas la Internacian Lingvon partoprenis en la urboj São João de Meriti kaj Duque de Caxias.

Enhavo

Post Kopenhago-Frostavallen . . .	61
Stafeto, freŝe alveninta	62
La evoluo de la esperanta poezio II . . .	65
Danlando	68
Duobla juneco de Azio	70
Antaŭmaja nokto	71
La nova sidejo de UEA	74

Rubrikoj

Esperantista vivo	64
Ricevitaj libroj	64
La Internaciaj Konkursoj 1962	64
Taskoj de la monato	67
Belartaj konkursoj 1962	67
CED	72
La juna vivo	74
47a U.K.	75
Tra la mondo	75
Nekrologo	78
Oficiala informilo	78
Radio	80

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

POST KOPENHAGO

Alproksimiĝas la tagoj de la plej grava monda manifestacio de la Esperantismo, al kiu ĉi-jare estas ligita aro da aliaj promesoplenaj aranĝoj. La preparlaboroj por la Kongreso progresas kontente kaj la aliĝoj, precipe en la lastaj semajnoj, alvenis en ĉiam pli granda nombro. Ekde 1956 la U.K. jaron post jaro evoluis ĉiam pli alten, kaj ĉiu el la Kongresoj havis ankaŭ ian specialan karakteron pro aparta evento ligita al ĝi. La pasintan jaron en Harrogate okazis la Unua Internacia Arta Festivalo. Ĉi-jara en Kopenhago okazos dum la Kongreso la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, en kies laboroj partoprenos ne nur sciencistoj-esperantistoj, sed ankaŭ sciencistoj ne parolantaj la Internacian Lingvon, sed la sola laborlingvo estos Esperanto. En la nuna tempo, kiam ĉiam pli kaj pli sentiĝas la lingvodiverseco kiel

obstaklo en la internaciaj rilatoj, tute speciale sur la scienca kampo, kaj kiam la gazetaro de la mondo dediĉas al la problemo ĉiam pli grandan atenton, tiu Konferenco havas unuarangan signifon por la vastigo de la uzo de la Internacia Lingvo por la scienco. En Kopenhago kunvenos la nova Komitato de UEA, kiu devos elekti la novan Estraron kaj akcepti la Duan Laborplanon de la Asocio. Krome, la unuan fojon kunvenos la reprezentantoj de la lokaj societoj por diskuti siajn problemojn, unuavice la realigon de la Laborplano en lokaj kadroj. La menciitaj punktoj karakterizas la laboran parton de la jam fiksita programo de la Kongreso. Ne mankos, kompreneble, diversaj kulturaj kaj distraj aranĝoj. Aparte akcentinda estas la sincera simpatio de la ĉefministro kaj aliaj eminentaj personecoj por la Internacia Lingvo. En tiaj kondiĉoj estas certe, ke la U.K. en Kopenhago fariĝos unu el la plej rimarkindaj eventoj kaj espereble la esperantistaro amase aliĝos en la sekvantaj semajnoj — ju pli frue des pli bone — por persone partopreni en tiuj decide gravaj laboroj kaj en amika agordo ĝui la artajn, kulturajn kaj distrajn aranĝojn de la Kongreso.

Tuj post la Kongreso okazos en Frostavallen internacia kultura aranĝo sub la ĝenerala titolo "UNESKO-Semajno". Temas pri la jam tradicia "Sveda Somera Semajno", kiun organizas la Sveda Esperanto-Instituto kun la financa helpo de la ŝtato. Prof. D-ro Hideo Yagi, Doc. S. Pragano, s-ro Jean Thierry kaj la subskribinto pritraktos en



- FROSTAVALLEN

serio da prelegoj la laboron de UNESKO, la grandan projekton "Oriento-Okcidento", la ĉefverkojn de la monda literaturo en la Internacia Lingvo. En Frostavallen okazos ankaŭ kunsido de kunlaborantoj de CED kaj pluraj kunvenoj de la partoprenantoj, kiuj pritraktos la plej efikajn metodojn por realigi la novan Laborplanon de UEA. Vespere okazos prezentado de filmoj, lumbildoj, sonbendoj kaj ne mankos aliaj distraĵoj, ekzemple improvizita kabaredo, dancado, ŝercoj kaj ludoj.

Frostavallen jam fariĝis koncepto. Ĝi ĉiam kombinas plej altnivelan laboron (prelegoj, diskutoj) kun plej agrabla kunestado, distraĵoj, sportoj, promenadoj, ludoj.

La loko mem por tiaspeca aranĝo estas absolute ideala. Frostavallen troviĝas je kelkkilometra distanco de la urbeto Höör, kiun oni atingas per va-


gonaro en 50 minutoj de Malmö. Rapidaj kaj komfortaj ŝipoj aŭ pramoj ĉiuhore transportas la vojaĝantojn de Kopenhago al Malmö. Frostavallen situas en vera granda arbaro, apud lageto, en kiu oni povas sin bani, en regiono romantika, kie la verdo de la arbaro, la bluo de la ĉielo kaj la viglaj koloroj de la somerdometoj respeguliĝas en la trankvila surfaco de la lageto. Frostavallen estas nek urbo nek vilaĝo. Ĝi konsistas efekte

nur el tri belaj konstruaĵoj: la dormejo (hotelo) kun ĉarme aranĝitaj ĉambroj kaj ĉambretoj, la domo kun la restoracioj kaj la moderna prelegejo. Krome la sportejoj. Tion kreis la homo. Ĉion alian donacis la naturo.


En Frostavallen bedaŭrinde estas loko nur por 80 personoj. Konsiderante la gravecon de tiu kultura aranĝo kaj precipe la diskutojn pri la Laborprogramo estus ege utile, ke ĉi-foje partoprenu la semajnon kiel eble plej multaj reprezentantoj de la landaj asocioj kaj de la plej grandaj lokaj societoj. Necesas do tuj aliĝi kaj tiucele kontakti la organizanton s-ron Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

Estas ankaŭ aliaj aranĝoj — ekzemple la antaŭkongreso kaj la Kongreso de TEJO — al kiuj necesas aliĝi kiel eble plej baldaŭ. Oni memoru, ke fruaj aliĝoj faciligas la laboron de la organizantoj kaj tiamaniere ebligas pli sukcesan aranĝon. Tial, frua aliĝo estas en la intereso ne nur de la Movado kaj de la organizantoj, sed ankaŭ de ĉiu unuopulo kiu intencas partopreni la Kongreson, la Semajnon en Frostavallen, aŭ kiun ajn alian aranĝon.

Prof D-ro Ivo Lapenna



(Supre) Intervjuinto Thorsen kaj intervjuito Régulo renkontiĝas je 2,200 metroj super la marnivelo, deklive de vulkano Teide, Tenerifo. (Sube) Naŭ titoloj el la serio "Beletraj Kajeroj". (Sur la kontraŭa paĝo) Dudek aliaj titoloj el la diversaj Stafeto-serioj.



Stafeto, freŝe alveninta el Kanariaj Insuloj

Intervjuo okaze de 10-jara jubileo

Ni venis al Insulo Tenerifo en decembro por parentezigi kelkajn semajnojn de la nebuloza dana vintro. Kaj vere, ĉiumatene alta suno igis nin pinĉi la brakojn: Ĉu somero eblas dum kristnasko? Ni krosis de insulo al insulo en la mirinda Kanaria Arkipelago: ĉie sama freŝa verdo, abunda fekundo, afabla popolo.

Kompreneble ni venis ankaŭ al *La Laguna*, plaĉa urbeto ĉe iama lago kun altaj Eukaliptoj, ne malproksime de la vulkanego Teide, kies erupcioj naskis kaj dominas la tutan Tenerifon. En la Laguna estas, krom Zamenhofstrato, kompreneble rondeto de bravaj Zamenhofanoj. Tie kreskas ankaŭ la plej alta kristnaskarbo. Kreskas, ĉar ĝi staras radike kun elektro-kandeloj kaj donacpakaĵoj surbranĉe.

Neniu monumento ankoraŭ troveblas en La Laguna pri ĝia plej vaste konata filo: *Juan Régulo Pérez*, sed la volumaro de la STAFETO-serioj ja estas por ni tia, kaj ĝi memorigas lin pli impone kaj efike ol ajna bronzaĵo. Do, tuj ni direktas nin al lia domo, kie akceptas nin kun gusto kaj kulturo sinjorino *Karmen Rodríguez de Régulo* kun ĉarmaj kvar filinoj. En bona Esperanto ni informiĝas, ke ja estas feria tempo en la universitato, sekve kaj kompreneble la profesoro troveblas en sia presejo, cetere en la sama konstruaĵo.

En unu el la "fulgejoj de Esperantujo"

Neniu tabulo avertas aŭ allogas, kiam ni eniras la pordon de la mondfama *Imprenta Gutenberg*. En la laborhalo energias la estro kun 6 helpantoj inter paper-amasoj kaj materioj presitaj, presotaj, binditaj, bindotaj....

— Nek tabulo nek reklamo necesas, ĉar ni jam havas tro multe por fari. Momente sole en Esperanto ni havas 6 librojn sub preso. Krome unu estas kompostata en Nederlando por akceli la aperon — kvalifikita laborforto ĉi tie ne pli estas. Ĉion ni devas mane komposti, ĉar kompostmaŝino por libroj ne troviĝas en la insularo! Ĉiam ni finpresas po 16 paĝojn, poste malkompostas, denove pretigas 16 paĝojn ktp. Komplika procedo ankaŭ pro transmara lego de presprovoj kaj multega korespondado pri lingvaj kaj teknikaj detaloj.

— Post 10-jara intensa eldonado, kiel statas la ekonomio?

— La vendoritmo estas bona, kaj pago preskaŭ ĉiam venas. Sekve mi ĉiam pli kaj pli investas en Esperanto-librojn! La unuaj 7 volumoj nun estas definitive elĉerpitaj, kaj aliaj baldaŭ sekvos. Sed ne ĉiam la financoj prosperis. La presejo ekestis kiel heredo flanke de mia edzino, kaj cetere per ŝuldoj, ŝuldoj. Sed ankaŭ mi komencis per arda deziro servi al tiu embria internacia kulturo, sen kiu la internacia lingvo estas nenio.

— Viaj unuaj libroj tamen ne estis esperantaj?

— Ne. Unue aperis trivoluma, granda verko: *Historia de Canarias*, pli ol 2000-paĝa, due alia trivolumo: *Nobiliario de Canarias*, pli ol 3000-paĝa inkvartaĵo. Por efektivigi tiun ĉi mi prunteprenis monon de ĉ. 400 personoj, sed nun delonge repagis al ĉiuj. — Tiel ekestis antaŭ ĝuste 10 jaroj la bazo por Esperanto-libroj, el kiuj aperis pli ol 30 titoloj en serioj belliteratura, popularscienca kaj primovada. Kiel vi scias, mi celis plenigi la vakuon post la malapero de la fama Literatura

Mondo — kvazaŭ stafete transpreni de ĝi la torĉon.

— Kaj el la trideko, kiu verko estas al vi la plej kara ?

— Pri libroj estas kiel pri infanoj : ĉiam la plej juna estas la plej dorlotata ! Mi havis multajn zorgojn, foje eĉ ĉagrenojn, pro miaj "infanoj", tamen pli da plezuro kaj kontentigo. Plej karaj, sendube, fariĝis al mi la originala poemaro *Esperanta Antologio*, kompilita de Auld, kaj *Lingvo kaj Vivo* de Waringhien. Sed ankaŭ *Kvaropo*, la volumo per kiu STAFETO debutis en 1952, alportis al mi apenaŭ takseblan ĝuon kaj fieron. Ĝi estis ja la unue videbla konkretiĝo de mia ambicio : eldoni en Esperanto.

— Kaj la forte polemika *Simpozio pri -ata/ita*, ĉu ĝi estas dolor- aŭ dorlotinfano via ?

— Ĝi estu kia ajn ! Ĉiukaze mi estas senrezerve kontenta pri ĝi. Tamen ne kredu ĝin fragila estaĵo ! Ĝi estas fortika bubo, kiu jam atribuis sincerajn vangofrapojn al kelkaj, nu, estimitaj samideanoj. — Ĝia enmondiĝo ja estas ago de profunda sincereco kaj objektiva prilumigo de la veraj lingvaj leĝoj, kaj ĝia celo estas la konservado de la unueco de la lingvo, bazita sur la sola, de ĉiuj akceptebla bazo, tiu de Zamenhof, preskribita en la *Fundamento* kaj montrita en lia verkaro. — Mi scias, ke ni iras kontraŭ influhavaj, dignaj personoj, tre altaj en la hierarkio de nia Movado, sed kiuj bedaŭrinde ankoraŭ ne akiris maturecon en la lingva tereno. Siatempe mi avizis ilin, sed ilia kredo estis pli insista ol miaj klarigoj, kaj ili skismeme daŭrigis la pludisŝiradon de la *Fundamento* kun fervorego egala al tiu, kiu kuraĝigis Don Kihoton entrepreni siajn heroaĵojn. Tio eble pardonigas la 340-paĝan amplekson de la *Simpozio*. Post iom da kvietiĝo de la nunaj ondoj, mi esperas povi presi objektivan, senpolemikan traktaĵon, nun verkatan, pri la verbaj aspektoj en Esperanto ĝenerale, do ne nur pri -ata/-ita. Tiu studaĵo kontribuos normalan komprenon kaj sekvan enkondukon de la t.n. aspekta vidpunkto en ĉiujn niajn gramatikojn, kaj per tio la atismo mortos naturan morton.

Inteligento fulmas post la okulvitroj, kaj nin surprizas tiu verva gestado, arda pasio, batalpreto ĉe ŝajna serenulo, sed leginte la *Simpozion*, ni konfesas la pravon de la agito, eĉ se certe la agonio de la atismo daŭros....


La homo malantaŭ la libroj

Malofte oni renkontas tiel inspiritan, senteman homon, samtempe tiel realisme praktikan kiel Juan Régulo. Ĉe li estas admirinda kombino de detalemo kaj larĝeco, humuro kaj serioza sindono. Li havas fabelan memoron, estas akuratega — promeso, diskreto, lojalo ĉe li estas sanktaj. Li havas kolosan laborforton : Ĉiutage unu leciono en la universitato (pri romanida filologio) kaj aparte pri Esperanto kvar horojn semajne en Instituto de Lingvoj de la sama universitato. Krome li redaktas la revuon de sia Fakultato, estas membro de humanismaj komitatoj, esploraj institutoj k.a. — Sur lia granda skribtablo regas perfekta ordo, sed en la giganta librobretaro li montras al ni ĉ. 30 prespretajn manuskriptojn por STAFETO kaj ankoraŭ 10 ne fintraktitajn. Sola li ĉion revizias, aranĝas, prikorespondas. Mem li direktas la presejon, faras la kontadon kaj persone ekspedas ĉiun opan libron ! Certe li ne bezonas spronadon*) sed pli ĝuste malŝarĝon por povi mem verki, ekz. por lanĉi sian originalan esearon *Rikolto*, longe promesitan.

Al timema demando, ĉu ni ne tro prirabas tempon, ni tamen aŭdas karakterize serenon respondon :

— Efektive homo povas havi tiom por fari, ke li tamen ne ĉion atingos !

Kaj dum du tagoj la profesoro-eldonisto montras sin ankaŭ nesuperebla turistgvidanto tra ĉiuj regionoj de Tenerifo. Li havas originan rakontĝojn, precipe kleras pri lokaj kreskaĵoj, kies riĉo nin ĉiam denove surprizas. Li milde indulgas trudemon flanke de kelkaj indiĝenoj, viktimoj de nia fotemo; ĉie li trafe kombinas historiajn eventojn



kun aktualaj konkretaĵoj. Ni konstatas, ke izolulo tre bone povas posedi klarvidon kaj vastan orientiĝon ankaŭ pri mondpolitikaj aferoj. Ne vane s-ano Régulo trapasis kiel centmiloj la "universitaton" de koncentrejoj kaj punlaborado dum kaj post la interfrata milito hispana. Ni komprenas, ke estas elteneble vivi eĉ sub rigora reĝimo, ĝuste ĉar ĝi agacas la individuan pensadon kaj ĉiutage eldevigas personajn decidojn. Paradoxse dirite, tio ŝajnas pli imperativa por homa digno ol la rutino de la demokratioj okcidentaj.

Ni aŭdas pri infana paŭperismo ĉe geavoj vivintaj ĝis antaŭ nelonge en kavernoj sur insulo *La Palma*, je kies dialektoj cetere li, ekspopoliinstruisto, doktoriĝis. Ni foriras al tiu eĉ pli ekzotika insulo, dum li forlasas nin per sia decida, energia paŝado, nur ŝajne ulo ronda kaj ridetanta, nur ŝajne izolita, ĉar pli vaste informitan samideanon en la movado ni ne konas.

Forflugante de tiu fokuso de nia skribita Esperanto-kulturo, kiel prokurioza hazardo de l'sorto fariĝis Kanariaj Insuloj, ni kiel la unuaj mane tenas freŝan prespretaĵon de la plej juna STAFETO-ido, *Specimene*, de Henri Baupierre, frandaĵo, ŝlosilverko, kiu vekos furoron, ĝenon, konsternon, ridegadon. Ĝi estas volumeto satira, parodia pri stiloj de l'korifeoj en nia originala literaturo. Ni legas, relegas entuziasme inter rideksplodoj!

Kompostmaŝino estas la modesta sed arda jubilea deziro de nia soleca insulano. Honora devo estos de ni, la legantoj, ĝin baldaŭ certigi per eĉ pli aktiva kunportado de la torĉo-stafeto. Honora devo, sed granda plezuro samtempe!

Poul Thorsen

*) *Aludo al Arĝenta Spŝono de Eldonejo KOKO, atribuita al Juan Regulo, 1959.*

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Armadians. En Barcelona la 24an de januaro al la geedzoj Armadians-Gil naskiĝis fileto, kiu ricevis la nomon Lluis.

Mehtonen. Al Stanislawa kaj Allan Mehtonen en Oulu, Finnlando, naskiĝis la 28an de septembro 1961 filino nomata Eeva Marja.

Van Gils. En IJmuiden, Nederlando, naskiĝis la 18an de septembro al ges-roj Van Gils-Verkaart filino Henrica Maria Dorothea, fratineto por Arjan, Hans kaj Sjaak.

Gefianĉiĝo

Masterman-Van Stolk. Gefianĉiĝis aktiva TEJO-ano K. Masterman, B.A. el Gerards Cross, Anglujo, kaj f-ino Anna Maria Van Stolk el Rotterdam, Nederlando.

Geedziĝoj

Bakker-ten Hagen. La 17an de januaro 1962 en Amsterdam geedziĝis s-ro Hans Bakker kaj f-ino Anĝelino ten Hagen.

Dall'Acqua-Curatola. La 19an de oktobro 1961 en Palermo, Italujo, geedziĝis s-ro Vittorio Dall'Acqua kaj f-ino Anna Curatola.

RICEVITAJ LIBROJ

S. Sakellaropoulos : GREKA METODO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO. Eld. la aŭtoro, Ateno, Grekujo, 1961. 176p. 25 × 17.5 cm. Prezo 20 steloj. Mendebila de la aŭtoro : S. Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, Athine, Grekujo.

Theodor Kilian : CVIČEBNICE ESPERANTA. Eld. Státní Pedagogické Nakladatelství, Praha 1961. 273p. 20.5 × 14.5. Prezo : bind. 12.10 kĉs; broŝ. 9.50 kĉs.

Maŭ Zedong : RAPORTO AL LA DUA PLENA SESIO DE LA SEPA CENTRA KOMITATO DE LA KOMUNISTA PARTIO DE ĈINIO. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1961. 28p. 19 × 12.5 cm. Prezo : 0.70 gld. (3 steloj).

A. Buckinx-Luykx : MODERNA MARTIRO. El la nederlanda trad. Frato Leotado De Ruyver f.c. Eld. Fratoj de l'Karitato, Bierbeek, Belgujo, 1961. 63p. 21 × 13.5 cm. Prezo : 25 b.f. (7 steloj).

M. Rétot : DE PARIZO AL PIRENEA MONTARO. Eld. Rétot, Parizo, 1962. 32p. 21 × 13.5 cm.

MATRIKEL 1962, KRISTLIGA ESPERANTOFOBUNDET. Eld. Sveda Sekcio de KELI, 1962. 40p. 15 × 10.5.

D-ro L. L. Zamenhof : FUNDAMENTO DE ESPERANTO (ELDONO INDONEZIA) de Liem Tjong Hie. Eld. Indonezia Esperanto-Instituto, Semarang, 1961. 98p. 19.5 × 15.5 cm. Prezo : 8 rpk + 1 rpk afranko ĉe Dj. Gadjah Mada 60, Semarang.

Alfonso Pechan : ESPERANTÓ-MAGYAR SZÓTÁR (Esperanta-hungara vortaro). Dua, reviziita eldono. Eld. Terra, Budapest, 1961. 464p. 14 × 10 cm. Prezo : 35 ft.

17TH INTERNATIONAL CONGRESS OF THE WORLD ORGANISATION OF YOUNG ESPERANTISTS. Raporto pri la 17a TEJO-Kongreso. 26p. 25 × 17 cm. Prezo nemontrita, sed ekzempleroj haveblaj de la Brita Esperantista Asocio.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1962

Stato je la 28-a de februaro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Francujo	6754	5098	75,48
2.	Nederlando	4942	3730	75,48
3.	Svislando	2103	1550	73,70
4.	Svedujo	6190	4555	73,59
5.	Finnlando	2525	1855	73,47
6.	Usono	3610	2595	71,88
7.	Britujo	6661	4631	69,52
8.	Danlando	2876	1948	67,73
9.	Hispanujo	2557	1520	59,44
10.	Germanujo	7085	3825	53,99
11.	Brazilo	4142	2135	51,55
12.	Norvegujo	1677	850	50,69
13.	Italujo	4253	1955	45,97
14.	Japanujo	3265	1355	41,50
15.	Belgujo	2006	730	36,39
16.	Jugoslavio	5560	1190	21,40

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	505	675	133,66
2.	Portugalujo	515	425	82,52
3.	Israelo	285	220	77,19
4.	Kanado	746	520	69,71
5.	Aŭstralio	1148	793	69,08
6.	Aŭstrujo	1440	820	56,94
7.	Sudafriko	250	125	50,—
8.	Madagaskaro	250	95	38,—
9.	Nov-Zelando	1184	330	27,87
10.	Islando	250	65	26,—
11.	Urugvajo	250	60	24,—

LA EVOLUO DE LA ESPERANTA POEZIO

de

MAG. WILLIAM AULD

(Daŭrigo)

En la neologisma disputo, kiu uraganis tra Esperantujo inter la du militoj, la granda ĉampiono de la poeziaj vortoj estis kompreneble d-ro Kalocsay, kaj nature kontraŭ lin direktiĝis la obusoj de la konservativuloj. Pro tio, multaj homoj ricevis la impreson, ke la koncernan poezian stokon efektive *kreis* en Esperanto la diablo Kalocsay, eventuale en kunlaboro kun tiu alia mefisto Waringhien. Tio ne estas vera. Ilia granda "kulpo" estis *kolekti* la stokon kaj ĝin listigi en la "Parnasa Gvidlibro" (1932), tiel atentigante la homojn (ne nur la poetojn) pri ilia ekzistado. Efektive, Kalocsay, kiel la plej produktiva kaj plej grandioza poeto de nia lingvo, mem proponis — aŭ, pli precize, *uzis* konkrete en siaj verkoj — plurajn novajn vortojn; sed strange, ĝenerale ne tiuj estis la plej atakataj, sed aliaj multe pli oftuzitaj kaj pli frue proponitaj de unuopaj poetoj. Mi ne volas ĉi tie tro detale pruvi tiun fakton, pri kiu mi faris apartan esploron; mi menciis nur manplenon da hazarde rememoritaj ekzemploj: ni trovas la vorton "fajna" ĉe Miĥalski en 1923, la vorton "tristema" ĉe Christaller en 1911 la vorton "dura" ĉe Feliks Zamenhof en 1912 kaj en Sharpe ("Travivaĵoj de Ro Ŝo") en 1913, la vorton "saŭdado" ĉe "La Revuo" ĉirkaŭ 1906, k.t.p. Kia do estis la vera evoluo de la afero? Ni ĉiuj scias, ke en 1887 la lingvo havis sume nur 904 vortojn; jam post sep jaroj en la Universala Vortaro troviĝis 2,599 radikoj; kiam aperis la Suplemento al la Plena Vortaro en 1954 la Fundamentaj kaj la Oficialaj vortoj sumiĝis je 4,425 radikoj. Evidente tiu kreskado okazis per la enkonduko de novaj vortoj; en nuraj sep jaroj la lingvo gajnis 1,695 vortojn! Kaj, ĝenerale parolante, tiuj vortoj estis urĝe bezonataj de la komuna lingvaĵo ĉiutaga, do oni ne plendis. Nur poste aŭdiĝis la unuaj plendoj, kiam Zamenhof kaj aliaj klasikaj verkistoj daŭre aldonadis vortojn al la stoko. Sed kio ne estis tiam tute klara al multaj esperantistoj, tio estis, ke la bezono daŭra por la novaj vortoj sentiĝis pro la grandaj laboroj sur ĝuste la *literatura* kampo. Por sia traduklaboro, ne por siaj ĉiutagaj rutinaĵoj, d-ro Zamenhof sentis la neceson de ankoraŭ pli vasta vortostoko; ankaŭ aliaj, inter kiuj la ĉefa eble estis la poeto Grabowski, reagis simile pro la grandiozeco de la entreprenitaj literaturaj taskoj. Mi intermetu ĉi tie, ke tute kompreneble poemon oni povas verki uzante nur la komunuzan vortostokon

— sed ne *ĉiam*, pro kaŭzoj jam tuŝitaj. Do, kiam la komuna vortprovizo de Esperanto estis jam sufiĉa, ankoraŭ sentiĝis la bezono por vortostoko pli pure literatura; kaj sekve Zamenhof uzis sume 1,294 neoficialajn radikojn.

Sed kelkaj esperantistoj povis akcepti tion, ĝuste ĉar ĝin faris Zamenhof, kiu, laŭ ilia opinio, kvankam ne laŭ lia opinio, havis apartajn rajtojn koncerne la lingvon de li iniciatitan. Ili tamen opiniis, ke post la morto de la Majstro tiaj novaĵoj devis ĉesi, kaj la lingvo devis ŝtoniĝi ĝuste en tiu stadio de sia evoluo. Tiu koncepto ignoras la fakton, ke la dato de la morto de Zamenhof estis io tute hazarda kaj senrilato al la preciza stadio ĉe kiu tiam troviĝis la lingvo. La literatura ekfloro de Esperanto ankoraŭ nur komenciĝis. Post la Unua Mondmilito aperis novaj verkistoj ĉie en Eŭropo, kies tasko estis daŭrigi la tradicion postlasitan al ili de la t.n. unua generacio. Ili surnaĝis la unuan ondon, sed ili celis al bordoj pli malproksimaj ol ĝis tiam atingis la pioniroj; ili volis krei literaturon neniel malsuperan al la naciaj literaturoj; kaj por tio la lingvo ankoraŭ ne estis kapabla. Kaj tial Kalocsay, Baghy (jes, ankaŭ Baghy!), Miĥalski, Hohlov, Nekrasov, la tuta t.n. "skolo" de "Literatura Mondo" kaj multaj aliaj ne hezitis ankoraŭ pli riĉigi la lingvon per 300-400 vortoj pli aŭ malpli "novaj", tiel fine kreante, apud la jam delonge sufiĉa komuna lingvo, plene kapablan literaturan instrumenton. Tion povas bedaŭri nur tiuj, kiuj subtaksas nian lingvon, tiuj, por kiuj ĝi estas nura "helplingvo" iel malsupera al la naciaj lingvoj, tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenas, ke, por ke lingvo kapablu ion, ĝi devas kapabli ĉion. Tiuj, por kiuj la lingvo estas (laŭ la vortoj de Kalocsay) "nobla, blanka, klara kaj senmakule pura", "en kies altartukon, freneze, post batalo, neniu adoranto jam viŝis sangan manon" ne povas bedaŭri, ke ankaŭ sur la kampo de la poezio ĝi montriĝas egalulo de malnovaj, politike pli potencaj idiomoj; tiaj personoj ĝojas, ke Esperanto estas la lingvo de ĉiuj — jes, de ĉiuj, inkluzive de siaj poetoj!

Sed kial mi diris, ke laŭ mia opinio la granda epoko de la poeziaj neologismoj jam finiĝis? En sia libro "Lingvo kaj vivo" Prof. Waringhien skribis: "Ni komencas rikolti la fruktojn (de la propaganda obstino de niaj antaŭirintoj). La tre granda plimulto de la nunaj esperantistoj estas homoj, kiuj ne partoprenis en la krizo de Ido, kiuj ne aŭdis

kaj jam vivantan de la manoj de siaj instruintoj, kiuj unuvorte respektas en ĝi tiun saman tradicion, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj". Mi mem rajtas atesti, ĉar mi apartenas al tiu esperantista generacio. Kiam, en la unuaj postmilitaj tagoj, mi finis aŭto-didakte lernolibron de Esperanto, la dua literatura verko, kiun mi legis, estis "Tragedio de l' homo" de Madách en traduko de Kalocsay, kaj la tria estis la "Infero" de Dante en traduko de Kalocsay. Tio estis hazarda elekto el librolisto, sed ĝi estis por mi feliĉa elekto: mi konas alian, nun tre faman, esperantiston, kies unua legaĵo estis traduko — mi ĝin ne intencas nomi ĉi tie — tiel malbona, ke li pro ĝi forlasis Esperanton, kredante la lingvon malkapabla je literaturo, kaj li estis nur malfacilege revarbita al nia afero, ĉi-foje pere de pli valoraj verkoj. Ĉiuokaze, mi volas emfazi, ke mi, postmilita esperantisto, akceptis la literaturan lingvon tia, kia ĝi estis. Mi eĉ ideon ne havis, ke pli frue la lingvo estis malpli riĉa, ke okazis iam disputoj kaj kvereloj pri neologismoj, kaj tio min cetere ne estus interesinta. Rezulte, la literatura Esperanto, kiun mi lernis, kaj kiun mi ensorbis en mian plej intiman memon, estis la literatura lingvo kreita de ĉiuj antaŭirintoj; kaj tiu estis lingvo, per kiu mi mem poste komencis verki. Estas al mi tre amuze, ke kelkaj personoj siatempe nomis min "novigema", "enkondukanto de neologismoj", k.s., kaj eĉ foje atribuis al mi la rolon, kiun iam ludis Kalocsay tiurilate. Ili tute eraras. Mi estas lingve tre konservativa persono, kaj mi konfesas, ke mi ne ŝatas — neologismojn. En miaj miloj da versoj originalaj kaj tradukoj mi nur unufoje sentis bezonon proponi mem neologismon — kiun, cetere, miaj kolegoj tre senentuziasme renkontis! Sed — mi ripetas — la lingvaĵo, kiun mi uzadas, estas tiu lingvaĵo, kiun kreis por mi kaj transdonis al mi ĉiuj miaj antaŭuloj — miaj grandiozaj antaŭuloj — sur la literatura kampo. Kaj, pli grave, la plej atenta esplorado ĉe la verkoj de miaj samtempuloj, la plej nova generacio de esperantistoj, konfirmas plene mian opinion, ke la neologisma epoko finiĝis, almenaŭ provizore. Ankaŭ miaj kolegoj estas, el vidpunkto de la vortprovizo, konservativaj; iliaj eksperimentoj, eĉ iliaj lingvaj eksperimentoj, ne kondukas al enkonduko de vortoj, sed al modifo kaj ekspluato de la jam ekzistanta stoko. La pretiga laboro super la lingvo estas farita — de Zamenhof, Grabowski, Kalocsay, kaj la multaj aliaj; estas nia tasko, utiligi tiun lingvon por la pli granda gloro de Esperanto kaj atingi de niaj finaj celoj. Ni "ricevis nian lingvon tute formitan kaj jam vivantan", kaj ni "respektas en ĝi tiun saman tradicion, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj". Niaj vortoj estas "neologismoj" nur al tiuj, kiuj memoras tiun tempon, kiam ili fakte estis neologismoj.

Mi jam diris, ke distingilo inter la poezio kaj la prozo estas la poezia ritmo, kaj mi promesis diri

kelkajn vortojn ankaŭ pri tio. Tamen mi opinias, ke tiu temo estas esence malgrava. Kio gravas, tio estas la poezio — la kreita artverko — kaj ne la relative sensuka teorumado, ĉu apriora, ĉu aposteriora. Poemo havas ritmon. Kelkfoje ĝi estas la tamburanta, salta ritmo de kanzono:

*Estas mi — papili'
gajflirtanta en aero,
dancas mi, ĝojas mi
tutan tempon dum somero,* (Miĥalski)

kelkfoje ĝi estas la flua, pompa, neregula ritmo de simfonio:

*Nebuloj ŝiriĝas printempo alarma
verdon frenezas kampoj per spiro mia varma
parojn de ĉirkaŭpreno
mi rulas sur ilin en la kokokria mateno
la ĉiel' pro ridego bluiĝas, ridegas la vento-
murmuro
kaj novaj eternaj vivoj ekiras sub ride benanta
Lazuro . . .* (Kalocsay)

sed esence ĝia sukceso aŭ malsukceso dependas, ne de iuj "reguloj" aŭ teorioj, sed de la harmonia talento de la poeto. Da teorioj ekzistas du specoj: la *apriora*, laŭ kiu oni starigas regulojn, aŭ por poste verki laŭ ili, aŭ por pravigi eventualajn strangaĵojn ĉe propra metriko; kaj la *aposteriora*, laŭ kiu oni ekzamenas la ekzistantan tradicion, por el la plej bonaj verkoj eltiri regulojn, kiuj gvidu aliajn poetojn al same bona verkado. Ambaŭ teoriaj specoj havas certan utilon, kompreneble, ĉar ambaŭ povas konduki al la intencita celo. Sed en neniuj kazo oni povas fari el la teorioj dogmojn, ĉar sur la kampo de la arto reguloj ekzistas por esti ignorataj. La sola valida regulo pri la ritmo estas: "AŬSKULTU al ĝia sono". Tute konkrete, se ni prenas la strofon:

*La gren' inundas. Riĉon vome ĵetas
Maŝinoj. Fluas kun miel' kaj mosto
La akvoj. Flugas por la pentekosto
Elektraĵ langoj. Paradizo pretas,* (Kalocsay).

estas indiferece, ĉu ni nomas la uzitan version (laŭ Waringhien) "kvinjambo kun fina senakcenta silabo", aŭ (laŭ Edwin de Kock) "kvintroĥeo kun komenca senakcenta silabo" — la verko mem restas tute la sama, kaj ĝia ritmo ne ŝanĝiĝas eĉ mikroskope pro la diversaj klarigoj! La verko mem estas la sola valida kriterio, kaj kiu volas analizi, tiu analizu, kaj mi deziras al li "Bonan apetiton". Sed mi rezignas diskuti ĉi tie la diversajn teoriojn pri la versfarado; mi ne pritraktos la aposteriorajn teoriojn de Waringhien kaj de Kock, nek la apriorajn de Clark kaj Bean. Mi volas diri nur, ke ni ne tro miru se, je la nuna stadio de nia poezio, iuj poetoj komencas serĉi eliron el la sorĉrondo de la ĝisnuna prozodio. La ĝisnuna prozodio de Esperanto, sub la manoj de laŭlitere centoj da adeptoj pro la ekzemplo de Kalocsay, atingis tian poluritecon kaj rafinitecon, ke apenaŭ eblas trovi per ĝi novajn variantojn de la ritma gamo. Kaj la poetoj, dank' al dio, estas maltrankvilaj animoj, kiuj baldaŭ tediĝas pri ripetigantaj efektoj, kaj eterne serĉas novajn rimedojn por la trafa esprimado de

siaj konceptoj. Kio estas farita, tion ne plu deziras fari la artisto. Kiam unu regiono estas plenesplorita, la pioniro ekiras al freŝaj horizontoj. Do tiurilate, ŝajnas al mi, ni staras sur la sojlo de nova epoko en nia poezio. Daŭre aperas novaj talentoj — imagu, ke, kvankam forpasis nur kvar jaroj depost la finpretigo de la "Esperanta Antologio", jam aperis novaj poetoj, kiu meritis reprezentigon en tiu verko! — kaj jam pluraj el ili, sin bazante sur la ĝisnuna tradicio, esploras novajn vojojn. Pri tio, signo de daŭra vigleco en nia literaturo, ni devas nur ĝoji.

Povas esti, ke iuj el vi iom miras pri tiu ĉi prelego. Vi venis, ĉu ne, por aŭskulti traktaton pri la evoluo de la esperanta poezio, jen mi disertacias nur pri la lingvo kaj la ritmo. Vi eble atendis, ke mi diskutos detale la rolon kaj atingojn de individuaj poetoj kaj ilian kontribuon al nia kreskinta poezio. Sed estus sencele tion fari, se vi ne komprenus la fonon antaŭ kiu ili ludis sian rolon. Poezio dependas de la lingvo, en kiu ĝi estas verkita; kaj oni ne povas taŭge kompreni la rolon de iu poeto, se oni ne konas la stadiojn de lingva evoluigo. Mi klopodis, ekzemple, montri al vi, ke la neologisma problemo estis natura fenomeno okazinta en ĉiuj lingvoj; espereble vi pli bone komprenos la atingojn de ekzemple Kalocsay, kiam vi komprenos, ke li *devis* ankaŭ certagrade krei la ilon, kiun li volis uzi, kiel siatempе *devis* fari pri la angla lingvo Edmund Spenser aŭ pri la franca lingvo Ronsard kaj la Plejado. La plateco, la amatoreco, la naiveco de — ni estu honestaj — eĉ pli bonaj poemoj el la plej frua epoko de Esperanto devenas, almenaŭ parte, de la fakto, ke poezia lingvaĵo apenaŭ formiĝis tiam. Estas ja vere, ke en la traduko de "Hamleto" (1894) Zamenhof sukcesis verki poezie; tamen ni ne forgesu, ke ĝin tra-

dukante Zamenhof *devis samtempe* krei la rimeadojn por fari la tradukon (tiel komencante la procedon, kiun ni jam detale pritraktis); la efiko de tiu laboro ne plene sentiĝis ĝis longe poste. Poemoj kelkfoje similas al infektaj malsanoj: ili inkubacias kelkan tempon antaŭ ol iliaj efikoj evidentiĝas!

Mi jam skizis, en la enkonduko al la "Esperanta Antologio", la nudajn faktojn pri la sinsekvantaj poetoj de nia lingvo. La ŝtupoj al nia parnaso estis tri: Zamenhof, Grabowski, Kalocsay. Sed ĉiujn niajn poetojn oni devas taksi en rilato al la supre indikita fono de la lingva stadio. Hodiaŭ nia poezio estas plenmatura; nia poezia lingvo estas plenkapabla. Kion alportos al ĝi la estonteco, mi ne antaŭdiros, ĉar mi ne estas profeto. Sed espereble vi, kiel mi, scivoleme atendas la venontajn verkojn, kiuj iam estu legaĵo de la tuta homaro. Estas karakterize pri niaj nuntempaj poetoj, eĉ pli ol pri iliaj antaŭuloj, ke ili fidis al nia lingvo kaj al ĝia estonteco.

Mi do finos mian prelegon pere de poemo de Edwin de Kock, kies titolo estas:

PRI LA ESTONTECO DE MIAJ POEMOJ

*Vortoj fluas el poeta plumo,
kaj papilioj el la primavero.
Vintro kaj mallumo ilin prenos,
sed miaj vortoj ĉiam restos junaj,
fortaj kaj senlace kantoplenaj —
ĝis nia tuta mondo elmodiĝos,
kaj pretere. Se barbaroj iam
remetus torĉon al la civilizo,
ĉu ne restus ie, ovpacience,
tra mortmalhela vintro de jarcentoj,
miaj poemetoj, por koviĝi
sub iu nova renesanca suno
kaj en dorlotanta reva koro,
por resonigi miajn pasajn pensojn
en la arkaika Esperanto?*

Harrogate, aŭgusto, 1961.

TASKOJ DE LA MONATO

1. Por ĉiuj organizaĵoj:

La landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj lokaj societoj detale diskutu dum unu el la kunsidoj aŭ kunvenoj la projekton de la Laborplano de UEA, publikigita en la marta numero "Esperanto"; ĉiu organizaĵo ellaboru sian propran planon de agado; la lokaj grupoj elektu reprezentantojn, kiuj partoprenos en la laboroj de la unua ĝenerala kunveno de la U.K. en Kopenhago; sendu proponojn pri ŝanĝoj aŭ kompletigoj de la Laborplano de UEA al via Komitatano A de UEA aŭ, se temas pri lando sen aliĝinta landa asocio, al la Estraro de UEA.

2. Aparte por la lokaj grupoj:

Okazigi almenaŭ unu prelegon pri la celoj kaj laboro de UEA (teksto de modela prelego havebla de la C.O. de UEA en Rotterdam) kaj organizi kolektadon de aliĝoj al UEA precipe en la kategorio de Membro Abonanto, kolekti la resp. kotizojn kaj sendi la aliĝilojn kaj kotizojn al la ĉefdelegito aŭ peranto; elekti delegiton kaj

vicdelegitojn, se ili ankoraŭ ne ekzistas en la koncerna urbo; organizi laŭ ebleco kolektivitan aŭskultadon de almenaŭ unu esperantlingva radio-disaŭdigo, instigi la membrojn regule aŭskultadi la esperantajn elsendojn kaj skribi al la koncernaj radio-stacioj; okazigi almenaŭ unu prelegon aŭ disaŭdigi la bendon pri la U.K. en Kopenhago (havegeblaj de la C.O. de UEA aŭ de la LKK en Kopenhago) kaj instigi la membraron aliĝi al la Kongreso.

3. Aparte por la landaj asocioj:

Nomi kiel eble plej baldaŭ la komitatanojn A de UEA, se tio ankoraŭ ne estas farita; elekti reprezentanton, kiu partoprenos la kulturaranĝon en Frostavallen post la Kongreso.

4. Aparte por ĉiuj unuopuloj:

Pagi la kotizon de individua membro al UEA kaj varbi almenaŭ unu plian individuan membron; skribi poŝtkarton al la radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto; aliĝi frue al la U.K., se oni intencas ĝin partopreni.

SE ĈIU PLENUMOS LA SUPRAJN

SUGESTOJN. LA INTERNACIA LINGVO TUTCERTE FAROS PLIAN PAŜON ANTAŬEN!

BELARTAJ KONKURSOJ 1962

Mi memorigas al ĉiuj verkistoj kaj verkemuloj, ke la limdato por ricevo de konkursaĵoj en la Belartaj Konkursoj estas la 31a de majo. Espereble la partopreno en ĉiuj branĉoj estos ĉijare vere impona; espereble absolute ĉiu aŭtoro kaj aŭtorino kunlaboros por certigi, ke la konkursoj ĉijare prezentos la plej bonajn verkojn en Esperanto.

Ĉiujn detalojn pri la partopreno oni povas legi sur p. 173 de nia oktobra numero 1961. Estas kvin branĉoj: originala poezio; tradukita poezio; originala prozo; originala drameto; kongreslanda branĉo.

Por la kongreslanda branĉo oni invitas tradukojn de poemo ("Aŭtuna ĝardeno") de Per Lange.

Oni sendu la konkursaĵojn al la peranto: S-ro Albert V. King, 20 Lodore Road, Fishponds. BRISTOL, Britujo.

William Auld, Sekretario

DANLANDO

DANLANDO..... vi trovas la nomon en via esperanta gazeto kiel nomon de la lando kie okazos la 47-a Universala Kongreso, 4—11 aŭgusto 1962.... Danlando? — vi iomete miras, duonfermas la okulojn, turnas la kapon, rigardas la nubojn.... sed nun vi volas esti certa: vi energie leviĝas kaj iras al la librobretaro.... la globo!

Vi ree sidas, la globo antaŭ vi... per la mano vi malrapide turnas la tutan mondon... via okulo serĉas.... Ĉinujo — Soveta Unio — el la geografiaj lecionoj en la lernejo vi memoras ion pri "la nordaj landoj", Skandinavio... via montra fingro iras pli norden... Balta Maro — Svedujo... ho jes, vere: malgranda punkto, apenaŭ kiel poŝtmarko... ŝajnas ke estas duoninsulo kaj kelkaj insuloj.

Certe, vi ne troigas: "Kelkaj insuloj! Danlando — Danmark, "kampo de la danoj" — konsistas el la duoninsulo Jutlando, kies landlimo apud Germanujo estas ĉirkaŭ 70 kilometroj, kaj kvarcent insuloj, el kiuj ekzakte cent estas loĝataj.

La surfaco de la lando ne estas impona: ĉirkaŭ 43.000 kvadr. km.; ne forgesu, tamen, ke en la norda parto de Atlantiko situas la Feroaj Insuloj kaj ankoraŭ pli nord-okcidente Grenlando, la plej granda insulo de la terglobo: pli ol du milionoj da kvadr. km.... ankaŭ ili estas partoj de la dana nacio.

La kongreso tamen okazos en Kopenhago, la ĉefurbo, belege situanta ĉe la Sundo, la marvojo inter la plej granda el la danaj insuloj, Selandio, kaj la suda parto de Svedujo, Skanio; tiu ŝipirejo kunligas la Baltan Maron al la okcidentaj eŭropaj maroj... "linio, kiu ne apartigas — balanciĝanta ŝoseo", kantas la danoj.

Danlando estas morena pejzaĝo, kies plej alta "monto" leviĝas al impona alteco: 173 m! Apenaŭ troviĝas punkto en la lando, kies distanco de la maro superas 50 km. La marbordoj de la duoninsulo kaj la multaj insuloj estas entute.... 7500 km: — Stranga lando! vi eble pensas — sed imagu vin staranta sur altaĵo, eble apud miljara menhiro... vi tie havas la eblecon rigardi fekundajn kampojn, pli diverskolorajn ol la ŝaktabulo, kompreneble — foliarbaron kaj plantejon de koniferoj — marĉon kaj erikejon — blankaj veloj pasas tra la lago — en la horizonto etendiĝas la maro... oni videtas la elegantan arkon de la ponto kiu kunligas du landpartojn... konfesu ke pravas la nacia himno, kies unua linio sonas: *Troviĝas ĉarma land'*...

Danlando tamen ne estas nur liriko — la danoj ankaŭ laboras, kun inventemo kaj bona humoro. La kooperativa movado de la farmistoj kondukis la terkulturon al gvidanta pozicio — la eksporto de agrikulturaj produktoj sumiĝas je pli ol 5 miliardoj da danaj kronoj (unu krono valoras iomete pli ol unu angla ŝilingo).

Cu vi havas la animon de ludisto? — ĉu vi vetas? — En Danlando oni estas streĉe interesata je la temo ĉu la industria eksporto baldaŭ superos la agrikulturan eksporton. Ĝis nun la agrikultura eksporto estis la pli granda... sed la industrio sekvas "je la kalkanoj" — la distanco ĉiujare malgrandiĝas... en 1958 agrikulturo 53 procentoj, industrio 47 — en '59 la diferenco nur estas kvar procentoj — en '60 tri procentoj... la hufoj de la vetkurantaj ĉevaloj tondras...

Ĉevaloj — nur bildo, kompreneble. Sed en la kamparo estas veraj kvarpiedaj ĉevaloj kiuj laboras kune kun la farmisto — ili estas laborkamaradoj kaj amikoj. Tamen, dum jam multaj jaroj la statistika kurbo koncerne al la nombro de laborĉevaloj en la farmoj estas malaltiĝanta — dum la nombro de traktoroj supreniras. En la aŭtuno 1961 do okazis la "skandalo": la du kurboj interkruciĝis preskaŭ ekzakte je la nombro 100.000...

Se tio lasas vin malvarma povas nur esti ĉar vi neniam


metis vian vangon al la varma, mola buŝego de ĉevalo! Oni povas bedaŭri la transformiĝon el homa vidpunkto... sed la dana farmisto ankoraŭfoje montros sian kapablon trapasi malfacilaĵojn. Kiel li en la lasta duono de la 19-a jarcento — precipe dank' al la popola altlernejo kaj la kooperativa movado — iĝis kapabla forlasi la tradicie konservatajn agrikulturajn kutimojn kaj krei la modernan, efikan terkulturon — tiel li ankaŭ hodiaŭ, cent jarojn poste, scios venki la malfacilaĵojn kiujn kaŭzos la aliĝo al la eŭropa komuna foiro. Li ne havos la helpon de kvarpiedaj amikoj, sed la nombro de radoj je lia dispoŝo kreskos; li fariĝos terkultura "inĝeniero" — li ne plu havos nigrajn ungorandojn, apenaŭ humo sub la ŝuoj, li ne plu laboras — el klasika vidpunkto — sed organizas...

...oni ja povas bedaŭri tiun evoluon; ĝi tamen estas neevitebla.


Vi eble miras pri la plurfoje nomita industrio. Vi ĵus legis ke Danlando estas moreno, malalta, ebena lando... sekve sen krudmaterialoj kiel fero kaj karbo... kaj malgraŭ tio oni parolas pri industrio, eĉ pri grava eksporto... ĉu oni mokas?

Tute ne! — sed la dana industrio unuavice estas pliboniga plivaloriga industrio, kiu produktas specialaĵojn kiel: ŝumaŝinoj, ŝipoj — ĝis ĉirkaŭ 50.000 tunoj — termostatoj, dieselmotoroj por ŝipoj.... La unua dieselŝipo de la mondo konstruiĝis ĉe Burmeister & Wain en Kopenhago en 1912. La unua vojaĝo de "Selandia" estis ne malpli ol mondhistoria okazaĵo.

Ŝajnas cetere ke la danoj posedas certajn kapablojn por teknikaj sciencoj. Ole Roemer (1644-1710) studis interalie la leĝojn pri fluado de likvaĵoj; li konstruis la mondfamajn grandajn fontanojn en Versailles, li kalkulis la rapidecon de la lumo kaj kunlaboris kun Newton pri la longeco de la sekund-pendolo. Hans Christian Oersted (1772-1851) eltrovis kiel la elektra fluo influas la magnetan nadlon — la fundamentan teorion pri elektro. — Niels Finsen (1860-1904) studis la influon de la lumo al



Oni ŝerce diras, ke Danlando tute ne havas klimaton, sed nur ŝanĝiĝantan veteron. Pro tio la rikolta tempo ĉiam estas ekscita periodo por la farmisto. Gvidataj de kampara belulino tri solidaj ĉevaloj de jutlanda raso rikoltas la sunoran avenon — ilian preferan manĝaĵon. Ĉu pluvos antaŭ la transporto en la garbejon?



Kvar drakoj, kies intervolvitaĵoj formas la pinton de la Borso en Kopenhago, gardas tiun ĉefverkon de la tempo de reĝo Christian IV (nask. 1577, reĝo 1588—1648). La Borso situas ĉe kanalo enfluanta en la maron: la ŝipoj, kiuj tiutempe alportis varojn el malproksimaj landoj (Kopenhago ja signifas: haveno de la komercistoj) alligiĝis ĉe la kajo laŭlonge de la borsostrato. Hodiaŭ oni nur komercas valorpapirojn en la Borso — sed la kanalo daŭre fluas dudek metrojn antaŭ la Borso kaj spegulas ĝian pinton kiel antaŭ tricent jaroj.

la homa organismo; en la mondfama Luminstituto de Finsen oni flegas haŭtmalsanojn, speciale lupuson, per diversaj specoj de lumo. Li en 1903 ricevis la Nobel-premion pro siaj esploroj. Jam en 1891 Johannes P. Sorensen (1861-1947) — kelkajn jarojn antaŭ Marconi — telegrafis kaj telefonis sen fadeno el milita ŝipo al tero; lia sistemo ne vekis intereson ĉe liaj superuloj. — En la mondekspozicio de Parizo 1900 Valdemar Poulsen (1869-1942) ricevis Grand Prix por sia kombino de telefono kaj fonografo — "la telegrafono". El lia kunlaboro kun P. O. Pedersen (1874-1941), la eminenta elektroteknikisto, naskiĝis tuta serio de gravaj eltrovaĵoj, i.e. la sistemo pri senfadena telegrafado. — Peter L. Jensen (1886-1961) en 1915 prezentis al la mirantaj Kopenhaganoj la unuan laŭtparolilon, "la grandan voĉon", Magnavox. — Niels Bohr (n. 1885), la atomsciencisto kaj fizikisto certe ne bezonas prezentadon; provu nomi eĉ nur unu mondkonatan atomfizikiston kiu ne studis kelke da tempo ĉe lia "Instituto de teoria fiziko"!

Sed la danoj ne nur kulturajn teknikajn kaj natursciencajn temojn. Du eminentaj lingvistoj brile gloriĝas en nia historio — Rasmus Raste (1787-1832) kiu post jarlongaj vojaĝoj i.a. en Azio regis... kiom da lingvoj? — divenu! — sepdek! En la plej multaj de tiuj lingvoj estas gravurita sur lia tombmonumento lia devizo: "Al sia patrolando oni ŝuldas ĉion fareblan". En la Reĝa Biblioteko en Kopenhago troviĝas manuskripto de Rask en kiu li starigas planon de la ideala lingvo; la reguloj preskaŭ estas la samaj kiel la principoj en Esperanto. La historia kaj kompara lingvistiko estis la tereno de Vilhelm Thomsen (1842-1927), kies ĉefa laborrezulto estis la deĉifro de kelkaj praturkaj enskribaĵoj en la norda Mongolujo, la t.n. Orkhon-enskribaĵoj (1893), per kio li fondis la turkologion.

Unu el la plej individuaj karakteroj de la historio de la homa spirito estas la filozofo Soren Kierkegaard (1813—

55) kies vivo prezentis vicon de mensaj revolucioj. Senbride li atakis la societon kaj precipe la oficialan kristanisman. Liaj verkoj dum la lastaj 25 jaroj aperis en multaj landoj; la studado de lia filozofio estas iom afero de modo... demandu la ekzistencialistojn!

Alian vidpunkton sur la religio havis N.F.S. Grundtvig (1783—1872), pastro, historiisto, poeto — oni sentas sin tentata diri ankaŭ: profeto. Li kontraŭbatalis la germanan racionalismon kaj atakis la ŝtatan eklezion; dufoje li eksoficiĝis — sed la intertempoj estis la plej fekundaj periodoj el aŭtora vidpunkto. Li tradukis la pranordajn legendojn kaj la nordan mitologion... kaj li verkis 1500 psalmojn, patrolandajn kaj historiajn kantojn; la plej bonaj muzikverkistoj de lia tempo subtenis lin per ilia kunlaboro. Li profunde studis la spiritan bezonon de la simpla homo — kiun li treege ŝatis — kaj kreis la "popol-altlernejon" por plenkreskuloj; la influon de tiu-ĉi lernejoformo oni tute ne povas troigi.

Inter la unuaj tradukoj de Zamenhof vi trovas ankaŭ danan verkon: fabelon de Hans Christian Andersen (1805—1875), kiun Zamenhof admiris kaj amis. Andersen mem nomis siajn fabelojn "por infanoj" — sed kvankam la infanoj instinkte komprenas ilin, ridas kaj ploras, la plenaĝa persono dum la tuta vivo povas daŭrigi trovi novajn subtilaĵojn, novajn belaĵojn. Se vi pasos tra la insulo Fueno haltu en Odense... la muzeo pri Andersen meritas vian viziton.

La milda, fuena dialekto estas la lingvo, "kiun parolas Nia Sinjoro dimanĉe por plezurigi la anĝelojn". Kiel reprezentanto de la jutlanda animo ni povas elekti Johannes V. Jensen (1873—1949), kiu evidentigis skismon en la dana karaktero, ĉar "ni sentas kiel Rousseau, sed pensas kiel Edison". Li ne nur pensis, sed ankaŭ sentis kiel Edison; post studoj precipe en botaniko, zoologio kaj biologio li uzis sian grandskalan kapablon por lingva novigo en serio de evolu-historiaj romanoj, "La longa vojaĝo" — jes, la vojaĝo vere estas longa, ĉar ĝi komenciĝas en la glacia epoko kaj finiĝas nur je la enkonduko de la kristanismo en la nordaj landoj. En la 20-a jarcento neniu aŭtoro havis pli grandan influon sur la publikan opinion kaj sur la pli junan generacion de verkistoj.

La danoj en iliaj esprimoj havas la kutimon "subeksposti", maltroigi. Speciale la jutlandano moderigas la frazojn. Vidante ĉarmegan junan virinon li tute ne eksplodas: Ho, kiel belega ktp. — ne, li kvazaŭ hezitante murmuris: Ŝajnas ke ŝi ne estas tro malbela...

Pri la kongreso en Kopenhago — tiu ne tro malbela urbo — mi aŭdacas diri: Verŝajne ĝi ne estos kompleta malsukceso!

Bonvenon.

Ove Dybkaer



La reĝa kastelo en Hillerød.


DUOBLA JUNEKO DE AZIO

Fine de septembro 1960, S-ro Tibor Sekelj plendis en mia ĉeesto ke li ne sukcesas trovi konvenan personon kiun UEA sendus en Hindujo kaj Nepalon por unujara instruado de la Internacia Lingvo en tiuj landoj. Mi ankoraŭ ne certas ĉu la gvidanto de APO tiam hazarde aŭ intence ŝercis proponante al mi tiun vojaĝon, siastilan. Tamen, estas tute certe ke S-ro Sekelj estis surprizita per mia tuja akcepto de lia propono. Kaj, ne nur ke mi forveturis en Azion, sed, pasiginte tie pli da monatoj ol da sekundoj mi bezonis por decidiĝi pri la vojaĝo, mi ree troviĝas en mia hejmlando.

Oni proponis al mi ĉimaniere resumi la vojaĝon pri kiu mi jam foje skribis por la legantoj de "Esperanto". Mi akceptis ĉar mi esperas ke mi ĉi foje povos priskribi ne nur la aferojn kiuj okazis post la tempo en kiu mi verkis la antaŭan artikolon, sed ankaŭ, foje tute alie prilumi la aferojn pri kiuj mi jam skribis. Krome, tuj ĉe la komenco mi rezignu je ĉiuj respondoj kiuj koncernas la sukceson de la tuta entrepreno kaj la daŭron de la atingitaj rezultoj. Tiaspecajn respondojn mi lasas por mia dua vizito al Azio.

Por plisimpligi la plenumon de mia nuna tasko, bonvolu akompani min dum mia perpenso reveturo en la plej interesajn lokojn kiujn mi vizitis. Nur, ne miskomprenu la vorton "interesa" ĉar mi neniam okupiĝis pri turisma propagando.

Kolombo. Dank' al akcidento de la ŝipo per kiu mi veturis, mi venis tien. Dum trista dektaga restado, mi nenion faris kaj nenion renkontis. Temis tamen pri la unua vera renkontiĝo kun Azio. Ĝi ne bele akceptis min. Suspektinda komercisto en la haveno kuraĝis demandi: "Sinjoro, ĉu estas eble ke vi estas edukita homo, kaj eĉ fundamenton de la angla lingvo vi ne konas?" Mi klopodis klarigi al li ke mi studis la francan kaj la rusan, sed sensukcese ĉar, ŝajne, ankaŭ lia angla lingvo estis nur iom malpli malbona ol la mia.



Tiu ĉi foto volas pruvi kiom multnombraj kaj simpatiaj estas junaj Nepalaj esperantistoj.

Madras. Pri S-ro Sundararaman mi aŭdis antaŭe. Mi ne scias kial mi imagis lin esti maljunulo kun barbo kaj turbano. Pro tio mi ne volis kredi kiam samaĝulo mia prezentis sin sub tiu nomo. Poste venis lia amiko, eĉ pli juna. Ambaŭ uzis sufiĉe bone la Internacian Lingvon. Nur, al mi ŝajnis ke ili ĝin ankoraŭ taksas esti bela kuriozaĵo. Mi klopodis influi ilian sintenon, sed sensukcese, ĉar mi rimarkis ke la aferoj kiujn ni en Eŭropo konsideras faktoj, ne ĉiam efikas tiel en Hindujo.

Delhi. Ĉar mi disponis nur pri la korespondadreso de s-ino Haudebine, mi klopodis unue kontakti s-ron Mahalingam, kies bonvenleteron mi trovis jam en Madras. Nenion plu mi volis supozi pri lia aspekto post la fuŝo en Madras. Tamen, kaŝe mi estis certa ke almenaŭ nun ne mankos barbo kaj turbano.

S-ro Mahalingam estis tiam 27-jara, alta junulo, edziĝonta du semajnojn pli poste. Li, ne nur flue, sed bele kaj senerare uzis Esperanton.


La unuaj vortoj kiujn s-ino Haudebine direktis al mi estis: "Ho, vi estas tiu malsaĝulo kiu ne anoncas sian alvenon!" Mi sukcesis iom pli poste klarigi la miskomprenon, sed mi ankoraŭ ne ŝanĝis mian opinion pri la sincereco de s-ino Haudebine, kiu jam tri jarojn aktivas en Delhi. Ŝi gvidis min al pluraj kursoj kiujn ŝi tiutempe gvidis en la hinda ĉefurbo. Kaj denove, preskaŭ ĉie mi renkontis gejunulojn, ofte jam tute flue parolantajn la Internacian Lingvon.

Poste, mi dufoje revizitis Delhi kaj zorgis ke mia restado estu utila por la klopodoj de s-ino Haudebine. Ni kune prelegis kelkloke, interalie ankaŭ en la Universitato de Delhi kie nun funkcias nova kurso. Krome, estis faritaj kelkaj gravaj kontaktoj kun la Nacia Aŭd-vida Instituto, la Registara Komisiono por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando k.a. Ĉio fakte estis sukcesoj de s-ino Haudebine, kiu nur uzis feliĉan koincidon de mia ĉeesto.

Kathmandu. La nepala ĉefurbo estis mia ĉefa laborloko en Azio. Pri la movado tie mi jam skribis (vidu la numeron de oktobro 1961). Jen mallonga statistika resumo kun kelkaj aldonoj: En Kathmandu mi restis preskaŭ 8 monatojn kaj dum tiu tempo gvidis 7 porkomencantajn kaj unu daŭrigajn kursojn. La kursojn partoprenis pli ol 200 gestudentoj. Escepte de 11 instruistoj, por kiuj funkciis aparta kurso, ĉiuj kursanoj estis gejunuloj. Kelkaj kursoj estis gvidataj en lernejoj kaj kolegioj, laŭ speciala permeso de la Edukministerio de Nepalo. Kiam mi forlasis Nepalon, mi kalkulis ke almenaŭ kvindek el la grandnombra kursanaro fariĝis esperantistoj. Du monatojn pli poste, dum mia dua vizito al la Nepala ĉefurbo, mi povis konstati ke mi ne eraris kalkulante tiel. Tamen, estas iom frue por atesti ion.

Patan estas la plej pitoreska Nepala urbo. Tie funkciis kurso en la loka kolegio. La kurson finis deko da junuloj kiuj nun preparas la fondiĝon de aparta societo. Dank' al la proksimeco de Patan kaj Kathmandu, ili nun kunlaboras kun la ĉefurba societo.

Lakhimpur-Kheri, urbeto en la plej postrestinta regiono de Nordhindujo. Tien invitis min profesoro Bhattacharya, kiu antaŭe prelegis en la Universitato de Kathmandu kaj tie lernis Esperanton ĉe mi. En la kolegio, kie li nun profesoras, mi faris prelegon kiun sekvis kvin provle-



Instruistoj de J. P. Altlernejo en Kathmandu kiuj partoprenis E-kurson.

cionoj por kvardeko da gestudentoj. La entrepreno ĝuis grandan simpatian de la tuta profesoro kaj antaŭ ne longe mi ricevis informon ke profesoro Bhattacharya en februaro ekinstruos la Internacian Lingvon tie.

Allahabad. Tie antaŭe estis fondita societo sed, kvankam ĝi ne plu funkcias, mi renkontis kelkajn homojn kiuj restis entuziasmiĝintaj kaj kiuj bedaŭras la mankon de pli firmaj kontaktoj kun la movado.

Kalkuto. Historio simila al tiu de la grupo en Allahabad. Tamen, la nuno tute diferencas kaj esperigas. Grupo de iamaj kursanoj de s-ro Sekelĵ, tute meminitate rekomencis lerni kaj jam atingis konsiderindajn sukcesojn.

Fulia. Kiam mi opiniis ke la plano de la du lastaj monatoj de mia restado en Hindujo estis definitiva, mi ricevis ne tute mallongan leteron en preskaŭ perfekta Esperanto. La letero per siaj kvalitoj igis min ŝanĝi la planon kaj viziti la urbeton Fulia, norde de Kalkuto. Tie mi trovis s-rojn Halder kaj Chakravartti, kiuj tute memstare ellernis Esperanton. Ili ambaŭ estas pedagogoj kaj sukcesis konvinki min resti tie dum tri tagoj kaj instrui al ili po kvar aŭ kvin horojn ĉiutage. Ĉe ili mi trovis dekon da elstaraj E-publikaĵoj. Kompreneble, mi ne plu miris ke ankaŭ ili du estas junaj (aŭ preskaŭ tiaj). Kaj, fakte, neniuj scias kiom da similaj izoluloj vivas en la vasta Hindujo.

Santiniketan. Tie troviĝas la fama Universitato de Tagore. Mi unue skribis al la Rektoro esprimante mian intereson pri la Muzeo de Tagore kaj kvazaŭ hazarde menciante mian pretecon ne nur utiligi mian viziton al la Universitato sed ankaŭ esti utila por aliaj. Sekvis oficiala invito kaj propono ke mi prelegu pri la kultura valoro de la Internacia Lingvo. La prelegon ĉeestis, krom multaj studentoj, pli ol dek profesoroj de la Universitato. Inter ili estis ankaŭ s-ro Lakshmiswar Sinha, la tradukinto de "Malsata Ŝtono" de Tagore. Se li ne estus tiom okupita per siaj profesiaj taskoj, li devus kontentigi la deziron de multaj interesitoj kaj komenci kurson de Esperanto en la Universitato.

Bombajo. Preskaŭ nur turisto mi estis tie. Tamen, mi sukcesis renkonti kelkajn estraranojn de la sufiĉe forta societo kiu sukcese aktivas tie. Malgraŭ la mallongeco de mia vizito al Bombajo, mi tie, samkiel en ĉiuj lokoj kie mi trovis esperantistojn, denove spertis tiun senkomparan gastamecon kiun konas nur ni esperantistoj.

Oni povus supozi ke Hindujo kaj Nepalo apartenas al la plej malfekundaj grundoj por ĝermodoj de Esperanto, pro la fakto, ke nenie en la mondo, iu ajn fremda lingvo havas tiel privilegiitan kaj kvazaŭ firman pozicion, kian ĝuas la angla en tiuj landoj. Se oni juĝas tiamaniere,

oni devus respondi jese, kvankam ne prave. Estas ja vero ke vi, sciante la anglan lingvon, povas veturi tra Hindujo preskaŭ senĝene, ne sentante lingvoproblemon. Mi nur aldonu ke tio absolute prava atesto restas nur se vi veturas en la unua klaso de trajno, aŭ simile. En la dua klaso oni renkontas problemojn, kaj en la tria oni ofte tute ne sukcesas interkompreniĝi. Onidire, el kvarcent milionoj de Hindoj, la anglan lingvon konas nur ok milionoj. Kion pri aliaj tricent naŭdek du milionoj de veraj hindoj? Ĉar, la okmilion socikremo almenaŭ duone ne plu restas hinda. Ĝi ne nur lingvon, sed kapon anglecan akiris. Se vi ekparolas kun ili, vi tuj aŭdos konfeson pri la malpureco kaj malriĉeco de ilia patrolando kaj ili ekpepos pri Ŝekspir aŭ Milton, ofte tute forgesante pri Vedo kaj Mahabharata. Tiuj homoj tute ne volas kredi ke en mia lando oni ne sukcesas interkompreniĝi anglalingve surstrate, kaj ke ni havas ĉiujn necesajn lernolibrojn en nia nacia lingvo. Multajn similajn aferojn mi povus citi por pruvi en kian situacion alkondukis Hindujo la uzado de la angla lingvo en tia amplekso en kia ĝi ankoraŭ en Hindujo estas uzata. Mi tute bone konscias kiom da avantaĝoj havas hindoj pro tia pozicio de la angla lingvo ĉe ili. Tamen, pri ĉio tiaspeca la hindoj mem plej bone konscias kaj kia estas tiu konscio plej bone ilustras la konstanta penado ilia por forigi la anglan lingvon de la loko kiun ĝi okupas. Ju pli oni prokrastas tiun forigon, des pli la problemoj kreskas, kaj en Hindujo ĝi jam kelkfoje verŝigis la homan sangon, eĉ lastatempe.

Pro la supra situacio mi atestas ke Esperanto havas tute samajn perspektivojn en Hindujo kaj Nepalo kiajn ĝi havas en Eŭropo, kvankam, nun restas iom pli malfacile agi en Azio ol en Eŭropo.

Fine, mi devas pravigi la elekton de la titolo de tiu ĉi artikolo. Temas pri la fakto ke la movado en Hindujo kaj Nepalo treege impresas per la juneco de ĝiaj adeptoj kune kun sia freŝeco el la historia vidpunkto. Ĉu tiu duobla juneco ne lasas sufiĉe da loko por reala optimismo?

Simo Milojević

Jan Filip:

Antaŭmaja Nokto

Kiel grandaj tombolampoj
brulas fajroj en mallum',
vento blovas super kampoj
grizajn nubojn de la fum'.

Maj' venonta ridon portas,
bluas akvo, verdas val'
— sed mi sentas: io mortas
en ĉi-nokta festival'...

La burĝonoj naskiĝontaj
jam odoras en aer',
tamen — en la fajroj montaj
io finas sur la ter'.

Kvazaŭ nokta papilio
ĝem' el kor' ekflugas jen.
Sed ĝojbruas la tilio,
flor' kreskiĝas en ĝarden'...

Kun granda bedaŭro ni rimarkas, ke enŝteliĝis tre grava preseraro en la tekston de la supra poemo, kiam ĝi aperis en "Belarto 2". Sekve, por ĝustigi la aferon kiel eble plej senprokraste, ni decidis presigi ĉi tie la korektan tekston. — Red.

FORPASO DE D-RO MAREK WAJSBLUM



La 19-an de februaro, kiel mallonge anoncite en la lasta numero de "Esperanto", forpasis en sia hejmo, pro koratako, D-ro Marek Wajsblum, longjara membro de UEA, unu el la plej elstaraj kunlaborantoj de CED dum multaj jaroj, precize ekde la 30-a de januaro 1952.

D-ro M. Wajsblum naskiĝis en Varsovio la 21-an de oktobro 1903. La mezgradan lernejon li finis en Varsovio kaj poste studis politikan sciencan, historion kaj pedagogion en la Universitatoj de Krakovo kaj Varsovio. Li doktoriĝis pri filozofio en la jaro 1928, estis licea instruisto inter 1930 kaj 1933, kaj denove de 1936 ĝis 1939 en Varsovio. La juna sciencisto baldaŭ famiĝis. Li estis redaktoro de edukaj filmoj en Pollando kaj kontribuis al la laboroj de la Pola Akademio de Sciencoj kaj Artoj kaj al diversaj historiaj revuoj. Li publikigis historiajn kaj sociologiajn studojn ĉefe en la pola, kaj kelkajn volumojn de beletraj tradukoj. Dum la milito, post multaj malfacilaj situacioj, D-ro Wajsblum fariĝis konsilisto de la Pola Ambasado en Soveta Unio en 1941—1942. Sekvis diversaj funkcioj, inter la aliaj: oficiro de la Pola Armeo en la Oriento, gvidanto de la Pola Scienca Esplorcentro por Meza Oriento en Jerusalemo, estro de la Lingva Sekcio ĉe la Pola Mezorianta Stabo. Ekde 1947 D-ro Wajsblum ekloĝis en Britujo, kie li unue estis fabrika laboristo kaj poste perlaboris sian vivon per esploraj kaj literaturaj laboroj.

D-ro Wajsblum ellernis Esperanton en la jaro 1921 kaj de tiam, en ĉiuj eblaj situacioj de sia maltrankvila kaj dinamisma vivo, restis ne nur fidela al la idealoj de sia junaĝo, sed ankaŭ plej aktive laboris disvastigante kaj instruante la lingvon, detruante antaŭjuĝojn kaj kuraĝigante la malfortajn spiritojn. Li estis unu el la gvidantoj de la

laborista Esperanto-Movado en Pollando kaj, interalie, redaktis la revuon "Jezyk Miedzynarodowy" (Lingvo Internacia), kontribuis al "Sennaciulo" kaj "Literatura Mondo", organizis la Jubilean Ekspozicion okaze de la U.K. en Varsovio en 1937. En Britujo li plue estis aktiva en la Laborista Esperanto-Movado. D-ro Wajsblum estas la aŭtoro de la Koresponda Kurso de Esperanto por la Nacia Konsilantaro de Laborkolegioj en Britujo kaj li estis ties gvidanto de 1952 ĝis 1956. En 1953 li vojaĝis al Islando, sub la aŭspicioj de UEA, por organizi tie informadon kaj instruadon. Plue li kontribuis al "Sennaciulo" kaj "Norda Prismo". Samtempe li estis dum multaj jaroj, ĝis sia forpaso, redaktoro de "The Worker Esperantist", en kiu li publikigis plurajn vere altvalorajn artikolojn. D-ro Wajsblum estis unu el tiuj kleraj kaj larĝmensaj esperantistoj, kiu bone komprenis, ke oni povas perfekte kunligi sian fidelecon al la Laborista Esperanto-Movado kun fideleco al la ĝenerala Esperanto-Movado, kiun reprezentas Universala Esperanto-Asocio. Kiel kunlaboranto de CED D-ro Wajsblum gvidis la sektion "Interlingvaj Projektoj", sekvis atente la evoluon sur tiu kampo kaj faris por CED multajn valorajn raportojn kaj verkis kelkajn studojn. En 1959, interkonsente kun kelkaj Londonaj kunlaborantoj de CED, li iniciatis la fondiĝon de la Esperanta Studo-Klubo, kies membro li restis ĝis sia forpaso kaj partoprenis ĉiujn kunsidojn, inkluzive la lastan de la 26-a de januaro.

Krom amaso da studoj kaj artikoloj, precipe en la pola, angla kaj en la Internacia Lingvo, D-ro Wajsblum publikigis ankaŭ konsiderindan nombron da elstaraj verkoj en la pola kaj angla lingvoj, el kiuj aparte menciindaj estas la studo el historio de reformacio "Polaj Diteistoj" (1928), "Historio de la Mondo", Vol. 1—2 (populara), du eldonoj (1930), "Isaac of Troki and Christian Controversy of the XVIth Century" (1951). D-ro Wajsblum verkis ankaŭ sub la literaturaj pseŭdonimoj M. Arco, M. Michałowicz, Marcin Wiosło, M. Markwetz, Jono, dum la milito: Josefo Nowak.

Laŭ la eksplicita deziro, esprimita nelonge antaŭ la forpaso, la kremacio estis absolute modesta kaj sen ceremonio. Malhelpita persone ĉeesti la kremacion, la direktoro de CED petis la sekretariion reprezenti CED, sed bedaŭrinde pro trafika konfuzo kaŭzita de subita neĝo, ŝi ne povis atingi la lokon. Anstataŭ florkrono, CED kaj kelkaj geamikoj de la forpasinto petis s-inon Wajsblum akcepti aliforman modestan helpon en ŝia nuna malfacila situacio.

La Esperanto-Movado perdis en D-ro Marek Wajsblum senkompromisan batalanton por la Internacia Lingvo, personon de senkondiĉa lojaleco, scienciston kun vastega kulturo de plej alta intelekta forto. Lia nomo brilos por ĉiam en la historio de la Internacia Lingvo kaj lia nobla personeco restos en daŭra memoro de ĉiuj liaj geamikoj. Al la edzino kaj filineto CED esprimas ankaŭ ĉi-maniera sian profundan kondolencon.

ESPERANTLINGVAJ RADIO-ELSENDOJ EN 1961

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris s-ro G. Larglantier, kunlaboranto de CED por la radio, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en 1961 estis 1485. Entute 15 radio-stacioj en 12 landoj elsendis programojn en la Internacia Lingvo. Kiel en la antaŭa jaro, la rekordon havas Radio Varsovio kun 365 programoj, kiuj daŭris 182,30 horojn; sekvas Bern kun 208 programoj, kiuj daŭris 34,40 horojn kaj Sofio kun 104 programoj en la daŭro de 43,20 horoj, aŭ Romo kun 156 programoj en la daŭro de 39 horoj. La nombro de la landoj kaj stacioj, kiuj elsendis en 1961, estas iom malpli granda ol en la jaro 1960, sed oni devas konsideri, ke s-ro Larglantier bedaŭrinde ne povis sekvi la sporadajn, ne-regulajn elsendojn, tiel ke la supraj ciferoj ne reprezentas precize la nombron de Esperanto-programoj. Tre verŝajne tiu nombro estas proksimume sama kiel en 1960. Radio estas grava kampo de praktika aplikado de la Internacia Lingvo. Ĉiuj landaj asocioj kaj la pli gravaj lokaj grupoj devus klopodi instigi siajn radio-staciojn, kiuj ankoraŭ ne elsendas en la Internacia Lingvo, enkonduki la lingvon por la regulaj elsendoj.

ESPERANTO-STRATOJ

En la aprila numero de "Esperanto", 1961, en la rubriko de CED aperis listo de urboj en kiuj troviĝas stratoj aŭ placoj kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto. En la decembra numero de "Esperanto", en la sama rubriko, estis publikigita aldono, laŭ kiu entute 157 stratoj aŭ placoj havas la nomon Zamenhof aŭ Esperanto. Post tio venis informoj pri jenaj pliaj stratoj:



La Zamenhof-Strato en Kaunas

Nederlando: 158. Dordrecht (Zamenhof-Aleo); *Germanujo*: 159. Köln (Zamenhof-Strato). *Francujo*: 160. Orléans (Zamenhof-Strato). *Soveta Unio*: 161. Kaunas, Litova SSR, (Zamenhof-Strato). Tiu lasta estas la sola Zamenhof-Strato en Soveta Unio. En tiu strato troviĝas la domo, en kiu iam loĝis la bopatro de Zamenhof kaj Klara Zilbernik, la posta edzino de D-ro Zamenhof kaj ĝuste tial oni nomis la straton laŭ la nomo de Zamenhof.

Ĉiujn informojn pri pliaj stratoj kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto bonvolu sendi al s-ro Renato Pennazio, Informoficejo de IEF, Casella Postale 248, Torino, Italujo.

LERNEJOJ

Rezulte de pluraj alvokoj, publikigitaj en la rubriko de CED, s-ro D. Kennedy povis kunmeti kompletigan liston de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata en tiu ĉi lerneja jaro (1961/62). Tamen, ankoraŭ multaj geinstruistoj ne sendis tiurilatajn informojn kaj tial CED decidis prokrasti la publikigon ĝis junio 1962. CED do ankoraŭfoje plej insiste petas la geinstruistojn de la Internacia Lingvo en la Lernejoj kaj la komisiitojn aŭ la landajn komisionojn en la lerneja kampanjo tuj informi la kunlaboranton de CED pri la lernejaj aferoj s-ron D. Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo, pri la klasoj de Esperanto en la lernejoj.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
S-ro N. R. Smith, Britujo	5-	-	
S-ino R. Sedden, Britujo	2-	-	
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1-	-	
S-ro E. Beck, Britujo	2-	-	
F-ino G. Memonnier, Francujo		5	6
S-ro J. Rapley, Britujo	1		
S-ro F. Parker, Britujo	-10-		
Gesinjoroj Laurie, Britujo	1-	-	
Novzelanda Esperanto-Asocio, Novzelando	10-	-	

La stato je la 27-a de februaro 1962 22-15-6

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenas finance ĝian laboron. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la oficejo de CED je la nomo de ĝia Direktoro.

En 1965 al Tokio!

La deziro partopreni la unua universalan kongreson en Azio kreskadas en la koroj de multaj esperantistoj. Regule alvenas ĉe la Centra Oficejo anoncoj de personoj kiuj jam principe decidis partopreni kaj ankaŭ la nombro de la ŝparantoj kreskas. Ekŝparu ankaŭ vi!

Oni pripensu ke, ju pli granda estos la nombro de vojaĝantoj per la internacia karavano, des pli ekonomie ĝi estos arangebla kaj des pli favoraj fariĝos la eblecoj por ĉiuj.

Vidu la artikolon sur p. 13 de la januara numero 1962 de "Esperanto". Petu informojn ĉe la C.O., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Dir. C.O.

LA NOVA SIDEJO DE U.E.A.

Kiam vi legos tiujn ĉi liniojn, la Centra Oficejo jam estos establita en la nova domo. Restos ankoraŭ sennombraj aferetoj farendaj, sed ili ordiĝos iom post iom. Taŭgan spacon nun ricevis la sekcioj administrado, korespondado, librotenado, kongreso, libroservo, ekspedado ktp. En la lastaj monatoj neeviteble la laboroj grave stagnis, sed ni varme esperas ke ni nun baldaŭ povos ĝisdatigi ĉion.

Ne nur la spaco, sed ankaŭ la aspekto de la nova sidejo estas nekompareble pli bona ol la malnova. Kvankam, kompreneble, pri lukso eĉ ne estis penso, ĉio estas aranĝita laŭcele kaj oportune kaj uzitaj estas taŭgaj modernaj materialoj. Estis necese fari por tio konsiderindajn elspezojn, sed ili estis faritaj por multaj jaroj. Ni havas fortan fidon ke ilin kovros la kontribuoj de la tutmonda membraro kaj precipe de tiuj personoj kaj asocioj, kiuj eternigis sian nomon per ĉambro en la domo. Tiurilate ni havas grandajn esperojn ankoraŭ pri kelkaj gravaj landaj asocioj kiuj per komunaj fortoj povus provizi la sumon de 5000.— gld kaj havigi al si ĉambron en la domo.

La oficialan inaŭguron de la oficejo ni antaŭ-

vidas meze de aprilo okaze de la printempa Estrarkunsido de U.E.A., en ĉeesto de lokaj aŭtoritatuloj.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ALIĜO AL U.K. KOPENHAGO

En la pasintaj jaroj okazis, ke granda nombro da kongresanoj aliĝis en la lasta momento, kio kaŭzis konsiderindajn organizajn komplikadojn. Kopenhago povos gastigi maksimume 2.200 kongresanojn kaj tial estas tre rekomendinde, ke ĉiuj, kiuj intencas partopreni la Kongreson, aliĝu kiel eble plej baldaŭ. Ni ankaŭ atentigas, ke konforme al la art. 26 de la Kongresa Regularo, post la 30-a de junio principe aliĝoj ne estas akceptataj. La LKK kaj la Estraro de UEA verŝajne devos apliki tiun ĉi regulon en tiu ĉi jaro kaj ne akcepti aliĝojn post la 30-a de junio. Sekve, aliĝu senprokraste al la Kongreso, se vi deziras partopreni ĝin aŭ se vi deziras ricevi la tutan kongresan dokumentaron eĉ se vi ne intencas persone partopreni. Petu aliĝilon ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.



LA JUNA VIVO


Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15
Wien X, Aŭstrujo.

strateta labirinto — kiu malestimas la idealon de la rektaj linioj — kaj faras viglegan dancon ĉirkaŭ la 700-jara monaĥejo kaj la Granda Placo, kie la "motorgejunuloj" varmigas siajn motorbiciklojn antaŭ ol ili malaperas brue tra la malvasta ĉefstrateto. Pluvego subite kaŭzas ombrelan interpuŝigon kaj transformas la stratojn tiel ke ili

Ystad - prezentado de la TEJO-kongresa urbo

Ĉirkaŭita de herbejoj, erikejoj kaj fruktodona terkulturo apud la Balta Maro situas Ystad, mezepoka sveda urbo kun 15.000 enloĝantoj. Skanio nomiĝas nia provinco, kaj dum tri jarcentoj post la paco en Roskilde ĝi apartenis al Svedujo. Multaj pli nordaj svedoj tamen daŭre konsideras nin kvazaŭ eksterlandanojn, opinias ke Kopenhago ankoraŭ estas pli da ĉefurbo por ni ol Stokholmo kaj diras ke ni babilas ian duondanan dialekton... En tiu maniero la nunjara TEJO-kongreso preskaŭ okazos en Danlando!

Ystad havas sian specialan melodion kaj dum jarcentoj konservis sian animon, speciale rimarkindan en la malnovaj trabfak-konstruaĵoj, la plej bone konservitaj en Svedujo. Dum la somero Ystad estas konata turisturbo, sed ni enloĝantoj amas ĝin same multe dum malagrablaj jartempoj. Aŭtune kaj vintre la vento rapidiras en la



Nia kongresejo, "Saltsjöbaden" — "La sallagbanejo".

aspektas kvazaŭ longaj bedoj da koloritaj fungoj. En la haveno la nebul-sireno faras fortan bruon, kaj en la baseno la ŝipŝarĝoj ŝiras en siaj aliĝiloj. La ondoj banas super la haven-digo, ĵetas putrajn tenajlojn en amasoj sur la ses kilometrojn longan marbordon kaj kunportas en siaj revojoj grandajn pecojn da blanka sablo malgraŭ la gardantaj ondorompiloj. Forgesita banbudeto ŝajnas eĉ ekprovi aventuran ŝipveturon antaŭ ol ĝi trovas sin kiel staplo da lignaĵoj laŭlonge la marbordo. La multaj somerdomoj staras tie forlasitaj kaj tute fermitaj en la konata "Sablarbaro". Tiam nia estonta kongresejo Saltsjöbaden levas sin griza al la ĉielo kaj similas al fantomkastelo. Postlasitaj muziktabletoj kaj la sonoj de malzorgeme malfermitaj fenestroj formigas autunan rapsodion kaj vintron. En la krepusko la lumoj ekbruliĝas en la urbo, kaj la sonoriloj de la monaĥeypreĝejo vokas al vesperhimno. La vespervivo ekfloras. Solenvestita publiko ĝuas la aventuron la "La Gaja Vidvino" en la belega 18-jarcenta teatro proksime al la maro. Sed la kvar kinejoj estas preskaŭ malplenaj pro la televidfebroy... En la plej pentrinda trabfaka domo kunvenas la diversaj junulaj organizoj por kursaj, konkursaj kaj amuzaj. Al sentimentalaj tonoj la belulinoj faras danceton kune kun la infanteriaj soldatoj kaj aliaj fraŭloj en la Popoldomo "Surbrunn". Malantaŭ francaj fenestroj en la malnova urbo-domo kaj sub longaj vicoj da kristallumoj la urba konsilantaro kliniĝas, cerbumante por eble fari novajn allogajn aranĝojn por la turistvivo, kiu kune kun la industria agado donas al la urba kaso monon.

Fiera vaporŝipo glitas al la kajo de la granda uzino Persöner. Tie ĝi trovas ĝian lastan havenon kune kun aliaj kolegoj de la sep maroj. Ŝajnas kvazaŭ la susuro de la vento estus flustro plenplena da aventuraj kaj streĉaj travivaĵoj inter fantomoj.

Laŭ iama kulturartikolo en urba gazeto (situanta ĉe Sladderĝatan = la Babilstrato!) la fama verkisto August Strindberg en la brilo de petrollampo en malgranda domo aliflanke de la strato iam skribis siajn venenajn atakojn kontraŭ la svedaj virinoj. En la monaĥejo troviĝas alia memoraĵo samtempa: La unua sveda aŭtomobilo, farita de du Ystad-fratoj. En la komenco de la jarcento ĝi timigis kaj homojn kaj bestojn de la urbo...

Post vintro alvenos somero, kaj baldaŭ la sablarbaro reverdiĝas kaj infanoj ludas sensuaj sur la rulŝtonoj. Sed sendepende de la sezonoj la turgardisto nun kiel antaŭe "dividas" la nokton, kaj ŝajnas ke oni aŭdas la malnovtempan sorĉist-helikon kanti en la malnovaj mallarĝejoj. Sed la somertempon ni ŝparos al niaj karaj gastoj el la tuta mondo. Bonvenon al Ystad, la libertempa urbo!

Karen Salmose



47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Sub la alta Protektado de la Dana Ĉefministro, Viggo Kampmann.
NOVA konstanta adreso:
ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Rotterdam, la 1-an de marto 1962

No. 6

Nova Konstanta Adreso.

Pro la translokiĝo de la Centra Oficejo de U.E.A. ni atentigas ke la nova konstanta adreso de la 47-a Universal Kongreso estas: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

TEJO-Kongreso.

La 18-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. okazos de la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto 1962 en Ystad (Svedujo).

Por informoj kaj aliĝiloj: S-ro Nils-Erik Kristoferson, Zederlunds-gatan 11 B, Motala, Svedujo.

Adoptaj Gepatroj.

Por helpi al esperantistaj infanoj el landoj malproksimaj aŭ kun malfortaj devizoj, la Loka Kongresa Komitato starigis la fondaĵon "Adoptaj Gepatroj", kun kotizo de 30 ned. gld. La ricevitaj sumoj estos utiligitaj nur por pagi veturadon kaj la restadon al tiuj infanoj.

Karavano.

Anoncis karavanon: Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W 11, Anglujo.

Scienca Konferenco.

La partoprenontoj al la "Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco" estas petataj sin anonci kiel eble plej frue al la Prezidanto de la Organiza Komitato, D-ro P. Neergaard, Gothersgade 158, København K., Danlando, aŭ al la Centra Oficejo de U.E.A.

Statistiko (ĝis fino de februaro):

Arabujo 1, Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 13, Brazilo 4, Britujo 111, Bulgarujo 7, Danlando 176, Finnlando 31, Francujo 76, Germanujo 71, Grekujo 2, Hispanujo 6, Hungarujo 1, Irlando 1, Islando 2, Israelo 2, Italujo 39, Japanujo 7, Jugoslavio 21, Kanado 1, Libano 1, Madagaskaro 1, Meksikio 2, Monako 2, Nederlando 60, Norvegujo 6, Nov-Zelando 1, Pollando 14, Portugalujo 7, Svedujo 111, Svisujo 7, Usono 9, Entute 798 el 34 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

Tra la Mondo

Aŭstralio

● **Esperanto-Domo en Sydney.** Proksime al la urbocentro en Sydney, New South Wales, la esperantistoj aĉetis propran domon, kie okazas la klubaj



kunvenoj, sociaj vesperoj, kaj aliaj aranĝoj. Imitinda ekzemplo — ĉiu grupo devus laŭeble havi propran sidejon.

Brazilo

● **Esperanto-rubrikoj en brazilaj ĵurnaloj.** Tri ĵurnaloj en Rio de Janeiro aperigas regulajn informojn pri la Esperanto-movado. Ili estas: "Diário de Notícias", "O Seminário" kaj "Correio da Manhã".

● **"Placo Esperanto" en Resende.** Dank' al efika subteno de la urbestro s-ro Augusto Pinheiro de Carvalho, la prezidanto de la Komunuma Parlamento s-ro Heitor de Oliveira Ramos, kaj urbkonsilantoj s-ro Odilon Motinha kaj s-ro Pedro Braille Neto, la 17an de decembro 1961 estis inaŭgu-



rita "Praça Esperanto" en la urbo Resende (ŝtato Rio de Janeiro). Nia bildo montras malkovron de unu ŝildo far la Urbestro. Sub la flago staras d-ro Carlos Domingues, prezidanto de la Brazilia Esperanto-Ligo. Specialan meriton en tiu ĉi sukceso havas nia Delegito en Resende, s-ro Sírío Silva.

Britujo

● **Unua markola kongreso.** La 12an kaj 13an de majo okazos en Bulonjo-ĉe-Mar (Francujo) la Unua Markola Kongreso, kiun partoprenos esperantistoj el sudorienta Britujo, nordorienta Francujo, Belgujo kaj Nederlando. La kongresa sekretario estas UEA-Del. Norman H. Smith, 14 B Castle Avenue, DOVER (Kent), Anglujo. La ampleksa programo inkluzivas procesion kaj solenan pilgrimadon al la Urba Teatro kaj Oficialan Akcepton de la Urbestro.

● **Letero en "Rotary".** Sekve de la raporto en "Rotary" pri la TEJO-Kongreso en Wokingham, aperis en la februara numero trafa letero de s-ro John Brownlee.

Ĉeĥoslovakio

● **Festo de la 60-jara ekzistado de Esperantista Klubo en Brno.** La 25an kaj 26an de novembro 1961 la esperantista klubo en Brno festis sian 60-jaran jubileon. Partoprenis per koncerto Kantista Ĥoro de la Konservatorio sub gvido de d-ro Zbyněk Mrkos kaj solistoj el Janáček-opero.

Francujo

● **Esperanto-kroniko en "Radio-R.E.F."** Ekde marto aperos en la revuo "Radio-R.E.F.", organo de la Franca Radioamatora Asocio, esperanto-kroniko. Sugestojn, rimarkojn, novaĵojn sendu al: s-ro Henri Y. Chaisnot, 28 rue Maréchal Foch, ORLEANS (Loiret).

● **Nova Esperanto-Strato en Orléans.** Laŭ la iniciato de s-ro Raymond Petit, vicsekretario de la Orleana Esperanto-Asocio "La Hedero", la grava komunumo Fleury-les-Aubrais apud Orléans havas nun sian Esperanto-straton (Rue de l'Espéranto). S-ro Pierre Delaire, direktoro de la nacia centro "Espéranto-Office" kaj prezidanto de "La Hedero", oficiale inaŭguris ĝin la 17an de decembro.

Germanujo

● **Prezidanto de la Eŭropa Parlamento Honora Protektanto de la 40a Germana Esperanto-Kongreso** La prezidanto de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo, prof. d-ro Hans F u r l e r, parlamentano de Germana Federacia Respubliko, akceptis la Honoran Protektecon pri la 40a Germana Esperanto-Kongreso, okazonta dum pentekosto 1962 en Oberkirch (Baden). Prof. d-ro Furler skribis en sia konsenta letero al la Loka Kongreso Komitato inter alie: "Mi scias, kiom multe helpas la internacia lingvo Esperanto kunligi la popolojn kaj servi al la paco".

● **Esperanto-strato en Oberkirch (Germanujo).** En la sudgermana mon-

taro "Nigra Arbaro" situas la ĉarma urbeto Oberkirch. Malgranda, sed vigla Esperanto-grupo zorgis per konstanta propagando, ke ĉiuj enloĝantoj (8000) scias, ke Esperanto estas utila internacia lingvo. En publika kunsido, okazinta la 29an de januaro, la urba konsilantaro (al kiu apartenas ankaŭ la estro de la Esperanto-grupo, s-ro F. W. Poppeck) unuanime decidis, ke strato en nova kvartalo havu la nomon "Esperantostrasse". La solena inaŭguro de tiu strato estos dum la 40a Germana Esperanto-Kongreso, okazonta je pentekosto 1962 en Oberkirch. — Bonvolu sendi amase gratulkartojn el la tuta mondo al urbestro s-ro Erwin B R A U N, Rathaus, 7602 Oberkirch (Baden), Germanujo.

● **Esperanto-Intervjuo kun Otto Pilhofer, Nürnberg en la Bavara Radio-Studio Nürnberg.** La 11an de februaro 1962 la bavara radio-stacio en sia elsendo "De la Majno ĝis la Danubo" elsendis intervjuon kun s-ro Otto Pilhofer, Nürnberg pri Esperanto. Ĝi komenciĝis per la esperantofrazo "La internacia lingvo Esperanto kreskas en Nordbavarujo, ĉar la gazetaro raportas". La raportisto daŭrigis: "Se vi estimataj aŭskultantoj ne komprenis tiun frazon kaj se la frazo ŝajnas al vi iom hispana, tio estis nek hispana, nek itala, sed mondkonata lingvo, nome Esperanto. Tiu elpensita lingvo por la internacia interkompreniĝo ĝuas, kiel estis konstatita antaŭ nelonge, kreskantan popularecon en Nürnberg kaj plie en 10 pluaj urboj de Nordbavarujo. Otto Pilhofer, la gvidanto de la Esperanto-Informejo en Nürnberg, rakontis al ni, kial".

Pilhofer rakontis, ke la nordbavara gazetaro publicis multajn artikolojn pri Esperanto kaj menciis, ke la Nürnbergaj gazetoj en 1961 publicis 69 artikolojn en la grandeco de 4900 kvadracentimetrojn.

La raportisto menciis ankaŭ aliajn faktojn, nome ke la unua Esperanto-grupo de la mondo estis fondita 1888 en Nürnberg kaj ke la urbo depost 2 jaroj posedas Esperanto-straton kaj ke multaj nordbavaraj urboj eldonis turismajn prospektojn en Esperanto.

Pilhofer klarigis esperantajn esprimojn, raportis pri kursoj kaj finis per la Esperanto-salutoj.

La raportisto diris: Ne nur en Nürnberg, sed en la tuta mondo, la Esperantistoj havas sian komunan himnon.

La unua strofo de la himno per gramafondisko finis la elsendon.

● **Akademia Esperanto-Grupo en Hamburg.** 20 sciencistoj el plej diversaj fakoj fondis en Hamburg novan Akademian Esperanto-Grupon por aranĝi universitatajn prelegojn pri Esperanto kaj vigligi la uzadon de Esperanto inter sciencistoj. Kiel prezidanton oni elektis inĝ. d-ro W. Hollnagel; estraranoj estas K. Schlüter kaj d-ro W. Bormann.

● **Düsseldorf eldonis esperantlingvan**

prospekton. Skribu al Werbe- und Verkehrsamt, Düsseldorf, Ehrenhof 3, dirante kial vi bezonas la prospekton.

Hispanujo

● **En la urbo Zaragoza** la esperantistaro bone kaj efike laboras por disvastigi nian ideon. Je la fino de la pasinta jaro 1961, okazis tre brila kaj impona Ekspozicio kiu estis ege vizitata kaj pruvis la vivecon de nia lingvo. Nun okazas tri Esperanto-kursoj en la citita urbo: unu en la loka Esp.-Klubo FRATECO, alia organizita por KEHA ĉe la sidejo de la viroj de "Katolika Agado" kaj la tria en la Socia Lernejo, kiel pasintjare. — Je la 8-a de februaro Eks-Rektoro de la loka Universitato, S-ro Miguel SANCCHO Izquierdo, sun la titolo "ESPERANTO RIGARDATA POR KATOLIKA PERSONO", prelegis en katolika Klubo CALIBA.

● **La Internacia Oficiala Specimenfoiro de Barcelono daŭre uzas Esperanton.** Por la jaro 1962 jam estas pretita la oficiala afiŝo pri tiu gravega foiro. (Jam por la tria fojo!!), en la Internacia Lingvo. Temas pri moderna gajkolora reklamilo en la formato 70 × 100 cm., kaj 30 × 40 cm., kiu taŭgas, ne nur por reklami pri la foiro, sed ankaŭ, por montri ĝin al skeptikuloj kiel gravan ateston pri la disvastigo de Esperanto. Ni petas al la tutmonda esperantistaro veran diluvon da leteroj por peti afiŝojn SENPAGE al: 30a Oficiala kaj Internacia Specimenfoiro, Propaganda Fakoj, Paseo de Maria Christina, s/n, Barcelona-4 Hispanujo.

Se eble skribu sur papero de komerca, turisma aŭ industria entrepreno kaj menciui la lokon kie la afiŝo estos montrata.

Israelo

● **"Hed Haĥinuĥ" (Eĥo de eduko),** en Tel-Aviv aperanta semajna revuo de la instruista fakorganizo de Israelo, dediĉis preskaŭ 4 paĝojn de sia 45a numero al Esperanto kaj ĝia aŭtoro. La kovrilon ornamis bildo de Zamenhof, kaj la artikolo, verkita de Eliezer Tivon, estas ilustrita.

Portugalujo

● **D-ro Chikao Fujiwaseda en Lisbono.** Kiam en 1921 la Ligo de Nacioj voĉdonis rezolucion pri la enkonduko de E. en la lernejoj, d-ro Chikao apartenis al la membraro de la delegacio de sia lando, unu el tiuj, kiuj plej batalis por la aprobo tiam akirita.

Estas tiu ĉi universitata profesoro, kiu en oktobro vizitis Lisbonon, veninta el Madrido. Ĉe la aerhaveno atendis lin la ĉefdelegito de UEA kaj lia edzino, s-anino Maria de Deus Antunes, reprezentantino de UL.

D-ro Chikao sukcesis veki veran intereson pri nia lingvo en la plej diversaj medioj, kiujn li vizitis kune kun lisbonaj esp-istoj. En la Beleta Fakultato, kie li parolis pri orienta filozofio kun profesoroj, kiel d-roj Délio dos Santos, D. Fernando de

Almeida kaj Fernando Moser; en la lisbona klubo de la rotarianoj, kie oni interŝanĝis la flagetojn de Tokio kaj Lisbono; en la klubo de la oficistoj de Shell-kompanio kaj ĉie, kie li estis afable akceptita.

En Casa da Madeira (Madejra Hejmo) okazis kunveno kaj tie nia ĉefdelegito, s-ano José Antunes, parolis pri la agado de APO kaj aludis al la neforgesebla vizito de s-ano Eizo Ito, salutante d-ron Chikao je la nomo de la ĉeestantoj. Nia japana s-ano parolis pri la celo de sia vojaĝo, emfazis la gravecon de nia movado en Oriento kaj promesis reveni al Portugalujo la proksiman jaron.

Sovetunio

● **El kunvenoj de la Esperanta Sekcio ĉe la Centra Kulturdomo de Medicinistoj en Moskvo.** 14.01.62 okazis tri raportoj: Unue — malnova esperantistino L. Sujetova faris raporton pri tre gravaj kaj interesplenaj biologiaj eksperimentoj pri arta edukado de la homa embrio de Itala profesoro Petruccio, kiu faris sian publikan elpaŝon en Moskva Universitato, kie ĉeestis sam-ino Sujetova. Due — Sam-ano S. Averkiev tre interese kaj kortuŝe rakontis pri la Hungara esp-a poeto Julio Baghy, kun kiu li persone konatiĝis en urbo Nikolsk-Ussurijsk en 1919. Varmaj vortoj de S-ano Averkiev estis dediĉitaj al la 71-a naskiĝtaga datreveno de J. Baghy. Samtempe al la jubileanto estis sendita salutletero de Moskvaj gasamideanoj. Trie — la aktoro N. RYTJKOV faris elokventan informon pri la Internacia Konferenco de Virinoj en Budapeŝt kaj pri nove-aperinta No. 3—4 de "Hungara Vivo".

21.01.62 okazis raporto en Esp-o de D-ro L. Kubasov pri medicino de la estonteco, kie la raportinto sciigis multajn interesajn detalojn pri jam atingitaj sukcesoj kaj novaj metodoj de kuracado kaj pri atendata en USSR progreso en tiu direkto estonte. Kiel pruvo de tio li komunikis, ke meza daŭro de homa vivo en USSR nun pligrandiĝis pli ol duoble de 32 gis 69 jaroj.... Ni esperu, ke nia vivo en nova socio estos sana kaj ĉiun malsanon oni kapablos kuraci dank' al novaj atingoj en medicina scienco, — per tiaj esperigaj vortoj finis la raporton D-ro Kubasov.

28.01.62 okazis vespero, dediĉita al honora memoro de la esperanta poeto Nikolao Hohlov (1891—1953 j.) Solenan vesperon ĉeestis filo de la poeto — Leonido Hohlov. La bonkoran kaj varmaniman komunikon pri la vivo kaj esperanta agado de la poeto faris malnova esp-istino N.I. Nikiforova, kiu en la fino recitis poemon "Chanteclair". Bonajn rememorojn pri la poeto eldiris D-ro K. Lavrentjev kaj la filo de la poeto — L. Hohlov.

Ĉeestinto s-ano Kolker el Kiŝinev (Moldavio) rakontis pri sukcesa esp-a movado en la urbo inter lernantoj, studentoj, instruistoj kaj scienculoj.

Post oficiala parto la memoron de

l' poeto honorigis per recito de liaj versaĵoj kaj versaĵoj pri li: K-ino Natalia Ajdarova: "Nia lingvo", aktoro Nikolao Rytjkov: — "Plendo", "Al Julio BAGHY" kaj respondo de lia Hungara poeto-frato: "...". Ĉe malnova samovaro — sidas ruso kaj hungaro"... kaj fine la tradukojn de N. Hohlov el poemo de V. Majakovskij "Per voĉo plena" fragmenton "Maldestra marŝo". La memorgesperon ĉeestis ĉirkaŭ 100 personoj.

Svedujo

● **XV: a kongreso de KELI en suda Svedujo.** Ĉijare la Kristana Esperantista Ligo Internacia sub la gvido de sia nova (32-jara.) prezidanto pastoro Adolf Burkhardt kongresos en Strandbaden, Svedujo, la 28 julio — 4 aŭgusto. Strandbaden estas mara banhotelo kaj kongresejo proksime de la urboj Höganäs kaj Hälsingborg en la plej suda Svedujo kaj ĝia restoracio havas la kapaciton de 280 lokoj. Antaŭ la kongreso okazos tie ek de la 23-a de julio kurso de Esperanto ĉe gejunula kampado. La adreso de ambaŭ aranĝoj estas: KELI-kongreso, Eyragatan 16, Örebro, Svedujo.

● **Matrikulo de svedaj KELI-anoj.** En la komenco de 1962 aperis nova matrikulo (40-paĝo) de la svedaj anoj de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Flanke de la adresaro kaj loka registro de la 544 membroj estas utilaj informoj kaj adresoj de kelkaj KELI-anoj en la ceteraj skandinaviaj landoj. El la svedaj gubernioj nun estas plej multaj KELI-anoj en Stokholmo (75), Kopparberg (70) kaj Örebro (57). Kompare al la matrikulo de 1958 plej multe kreskis gubernioj Stokholmo kaj Älvsborg.

La 28 apr. — 1 majo la sveda sekcio de KELI aranĝos sian jarkunvenon kaj kongreson en Alingsås, i.a. kun prelegserio de la norvega KELI-ano lektoro J. H. Rosbach. Aliĝojn akceptas S-ro Ingvar Lagerström, Ravinvägen 2, Alingsås.

Svislando

● **Sur ĉarma Oberbalmberg (1024 m.s.m.) okazos de la 2a ĝis 8a de sept. la 4a Internacia Feriosemajno.** Agrablaj, interesaj ekskursoj al Bern, ĉefurbo de Svislando, Burgdorf kun sia pentrinde bela kastelo, al Solothurn kaj per seĝolifto sur la Weissenstein-monton (1400 m.) Granda semajnfina ekskurso trans la lagoj de Biel, Neuchâtel kaj Murten.

Moderaj prezoj en komforta feria hejmo. Detalan programon petu de Hans Hunkeler, poŝtfako 417, Aarau.

● **Jubilea poŝtstampo.** La svisa poŝtadministracio en kunlaboro kun la svisa esperanto-societo uzas en la jubilea jaro specialan stampilon por senvalorigi la poŝtmarkojn. La stampilo havas portreton de d-ro Zamenhof kaj la tekston "75 Jahre internationale sprache" (75 jarojn internacia lingvo). En januaro ĝi estis uzata en Basel kaj Luzern, en februaro en Biel kaj Zürich, en marto en Olten kaj Winterthur.



Aliaj lokoj sekvas. Interesatoj povas sendi al la suba adreso adresitan respondkoverton kaj 2 internaciajn respondkuponojn (aŭ 3 stelojn): J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 57, Svislando.

● **Varbajn poŝkalendaretojn 1962 eldonis Svisa Esperanto-Societo.** Bele faritaj, ili havas sur la dorso opiniojn de eminentuloj pri la valoro de Esperanto kaj zorge elektitajn varbfrazojn.

Usono

● **Novajo pri la Harvard Esperanto-Klubo.** Post kvinjara manko de por-esperanta agado al Harvard Universitato, du studentaj samideanoj, Russell Stevens kaj Jonathan Pool, fondis Esperanto-klubon en oktobro 1961. Novembre ĝi estis oficiale sankciita kiel studenta organizaĵo, kun la nomo Harvard Esperanto Club. Jen informo pri la agadoj de la Klubo:

Publikigado:

Plejparte per esperantaĵoj havigitaj de D-ro E. James Lieberman, Estraro de al Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, la Klubo kunmetis grandan (ĉirkaŭ 23 kvadratajn metrojn) migrantan ekspozicion. Dum du monatoj ĝi estis montrata en la subdiplomita librarejo (Lamont Library) ĉe Harvard. Dum la sekva monato ĝi estis en la ĉefa librarejo de la Massachusetts Instituto de Tehnologio. Dum la monato majo ĝi montriĝos en la Boston Publika Librarejo. Ankaŭ malgrandan ekspozicion la Klubo montris en banka fenestro ĉe la ĉefstrato de la urbo (Cambridge) dum unu semajno. Plejparte la ekspoziciojn talente desegnis la kluba kasisto, Hugh Russell.

Ĉe la februara studenta registrado la Klubo disdonis al ĉirkaŭ mil studentoj proksimume 1200 informfoliojn pri Esperanto kaj pri la Klubo.

Letero skribita de Klubano Joseph Knowles al la redaktoro de granda Bostona ĵurnalo, la Boston Herald, pri la uzo de Esperanto lerneje anstataŭ la latina lingvo, estis tie presita, kun la klubadreso; ni subite ricevis 18 informpetojn, enhavante unu de instruisto, kiu volas informi siajn studentojn, kaj unu de grupo kun 15 interesitaj anoj.

Krome la agadoj de la Klubo estis anoncadataj en la Harvard Studenta Kalendaro, la Harvard Universitata "Gazette" (Bulteno), kaj la ĵurnalo la Harvard Crimson (Karmezino).

Kursoj:

La Klubo instruas Esperanton dufoje ĉiujare en ok-semajna fundamenta kurso per la lernolibro, **A Practical Course in Esperanto**. Instruadas la Prezidanto, Russell Stevens, kaj la Ĝenerala Sekretario, Jonathan Pool.

Pro malfrua komenciĝo la aŭtuna kurso allogis malmulte da regulaj ĉeestantoj, sed ĉirkaŭ 10 lernantojn havas la printempa kurso. Entute la Klubo jam vendis 52 lernolibrojn kaj dek vortarojn.

Studentoj ĉeestintaj la aŭtunan kurson jam partoprenas la ĉiusemajnan Esperanto-Vespermanĝon en la diversaj kolegiaj manĝejoj kaj la ĵuskomencitan Esperanto-Studrondon, kie oni unue legas kaj diskutas la libron **Medalionoj**.

Debato : je la 15a de februaro okazis Harvarde debato, planita de la Klubo, inter D-ro Lieberman por Esperanto, kaj D-ro John Wight, el Brandeis Universitato, por la angla lernenda per Baza Angla, kiel internacia lingvo. Almenaŭ unu urba ĵurnalo kaj unu radioelsendejo anoncis la debaton, kaj ĉirkaŭ 47 aŭskultantoj ĝin ĉeestis.

Poste unu radioelsendejo mallonge raportis pri la debato dum novaĵprogramo.

● **La Deko Kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko** okazos en Chicago, Illinois, Usono de la sesa ĝis 8a de julio, 1962 en la Hamilton Hotelo. Informojn donas la Kongresa Sekretariino, F-ino Lee Gridley, 1100 N. Dearborn St., Chicago, Illinois, Usono. Eksterlandaj vizitantoj kaj partoprenantaj gastoj estos tre bonvenaj !

NEKROLOGO

Blacklock. La 4an de septembro 1961 mortis en Bournemouth, Anglujo, s-ino L. E. Blacklock. Ŝi naskiĝis en Francujo, kaj kunlaboris kun Lidja Zamenhof en la sudo, kie ŝi estis la prezidantino de la Provenca Federacio.

Rabassa. En la urbo Palma de Mal-

lorca, Balearaj insuloj, la 17an de januaro 1962 mortis je aĝo de 84 jaroj moŝta s-ro Bernardo Rabassa Boeras, artileria kolonelo, Honora Prezidanto de Baleara Esperanto-Asocio. Vera pioniro, ĉar li esperantiĝis je la komenco de la nuna jarcento, li ĉiam restis lojala al Esperanto. Okaze de la lasta Nacia Kongreso de Esp. en Palma dum majo 1961 li partoprenis kelkajn kunvenojn.

Rusch. La 3an de januaro 1962 mortis Wilhelm Rusch, membro de la Hamburga Esperanto-Societo, post tre longa malsaneco. S-ro Rusch naskiĝis la 27an de julio 1901, kaj fariĝis esperantisto kaj membro de U.E.A. en 1921.

Wołczyk. La 16an de oktobro 1961 mortis instruistino Jadwiga Wołczyk, amata edzino de nia delegito en Sosnowiec, Pollando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO N-ro 346

DELEGITOJ

Acoroj

Velas.

D : vakas.

FD (Geografio) : vakas.

Aŭstralio

Manly (New South Wales). 35.943.

D : S-ino M. Duncan, instruistino, 119 Bower Street.

Shepparton (Victoria). 13.000.

D : A. Turner, optometristo, 251 Wyndham St.

Aŭstrujo

Knittelfeld (Steiermark). 15.000.

FD (Fervojoj) : L. Stocker, fervojisto, Kärntnerstr. 12.

Belgujo

Antwerpen

FD (Komerco: virvestaĵoj) : E. Paesmans, tajloro-komercisto, Lange Koepoortstraat 64.

Bruxelles

FD (Kongresoj internaciaj) : G. C. Fighiera, fakestro de internacia organizaĵo, 13, rue de la Reine - Bruxelles 1.

Mechelen (Antwerpen). 64.700.

D : S-ino A. Sprengers-Vranken, Spreeuwenhuisstraat 23.

FD (Turismo) : la D.

Brazilo

Brasilia (Distrito Federal). 128.000.

D : P. Vieira da Silva, ŝtatoficisto, Trib. Contas União (Secretaria), Bloco Ministerial 7, 2. andar.

Cachoeira do Sul (Rio Grande do Sul). 100.000.

D : A. Trarbach, bankisto, Banco Agrícola-Mercantil S/A - Poŝtkesto 20.

Curitiba (Paraná). 200.000.

FD (Ŝakludo) : L. Silva, fervojisto, Avenida Anita Garibaldi 1.710.

Itabuna (Bahia). 160.000.

FD (Lingvoj) : A. Rocha, instruisto, Rua Belo Horizonte 133.

Jatai (Goiás). 28.000.

D : S-ino M. Conceição de Souza, instruistino, Rua Zéca Lopes 1003.

Muritiba (Estado da Bahia). 39.000.

D : M. Borges dos Santos, instruisto, Rua Dr. Zamenhof 70.

FD (Instruado) : la D.

Recife (Pernambuco). 798.000.

VD : L. C. Franco, bankoficisto, Caixa Postal 824.

FD (Sindikataj aferoj) : la VD.

Rio de Janeiro (Guanabara). 3.500.000.

FD (P.T.T. Telekomunikado) : A. de Lima Rocha, telegrafisto, Trav. Palmital 27, Cascadura.

FD (Turismo) : A. Maceira Rodriguez, tajloro, Rua Joaquim Palhares 485.

Rio Grande (Rio Grande do Sul). 100.000.

D : M. Torres Abreu, bankoficisto, Rua Luiz Loréa 283.

São Leopoldo (Rio Grande do Sul). 80.000.

D : C. H. Dionísio, emerita muzikisto, Strato Santo Antônio, 897.

Britujo

Ashurst (Hampshire). 2.000.

D : W. J. Nesbitt, instruisto, 60 Woodlands Road.

Fochabers

D : vakas.

Godshill (Isle of Wight). 1130.

D : H. A. Mason, pastro, The Vicarage.

Haslingden (Lancs). 16.000.

D : F-ino E. Berry, instruistino, 325 Blackburn Rd.

North Shields (Northumberland). 10.000.

D : L. Romania, kompostisto, 43 Kirklington Road, Marden Estate.

FD (Liberpensado) : la D.

FD (Presado) : la D.

FD (Pripacaj aferoj) : la D.

FD (Sindikataj aferoj) : la D.

Plymouth D : vakas.

NIEUWE BINNENWEG 176

ROTTERDAM-2 - NEDERLANDO

Reading (Berkshire). 117.700.

D : H. E. Scream, lokomotivestro, 25 Audley Street.

FD (Fervojoj) : la D.

Bulgarujo

Gabrovo. 55.000.

FD (Sociaj aferoj) : P. Totev Petkov, laboristo, Str. Skobelevska 30 apart. 20.

Ĉeĥoslovakujo

Karlovy Vary. 45.000.

D : J. Lička, masonisto, Bohatice nám. Říjnové revoluce 12.

FD (Turismo) : la D.

Košice (Slovensko). 104.000.

D : Ing. J. Fischhof, maŝiningeniero, emerita profesoro, Národ. povstania 24.

Praha (Ĉeĥy). 1.000.000.

FD (Geografio) : M. Rudolf, produktanto de Filma Studio Barrandov, Moskev ská 23/III, Praha 10.- Vršovice.

FD (Radiodisaŭdigo) : Soňa Hodková-Rudolfová, reĝisorino de Radio Prah, aWilhelma Piecka 117, Praha 3.

FD (Teatro) : la FD (radiodisaŭdigo).

FD (Veterinaraj aferoj) : Dr. V. Svátek, veterinaro, U. Plátenice 5, Praha 5 - Smíchov.

Danujo

Nørbaek. 900.

D : F-ino R. Lønblad, instruistino, Faarup.

Finnlando

Lohja (Uusimaa). 9.000.

D : V. Nyström, instruisto, Harjun kansakoulu.

Sulkava (Mikkelin lääni). 7.000.

D : J. Vilkki, instruisto, Sulkava.

Francujo

Montpellier

D : vakas.

St. Laurent de Brevedent

FD (Filatelo) : vakas.

Germanujo

Hilders

D : vakas.

FD (Turismo) : vakas.

Hindujo

Lakhimpur-Kheri (Uttar Pradesh).

D : P. K. Bhattacharya, profesoro,
Y. D. College.

Hispanujo

Valencia

D : vakas.

FD Mondfederalismo) : vakas.

Israelo

Nahariya

FD (Ekonomio) : vakas.

Italujo

Cortina D'Ampezzo

D : vakas.

Trieste

FD (Ŝnur-fervojo) : vakas.

Nederlando

Diever

D : vakas.

Norvegujo

Oslo

FD (Artfika lo) : vakas.

Portugalujo

Lisboa

FD (Radio) : vakas.

Svisujo

St. Gallen

FD (Religio KELI) : vakas.

Zürich

FD (Fervojoj) : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Edler, S-ro Per, Göteborg, Svedujo.
Göldin, F-ino M., Bern, Svislando.
Hoogendoorn, S-ro R. L., Amersfoort,
Nederlando.
Shaw, S-ino E. M., Wanganui, Nov-
Zelando.

PATRONO 1962

1. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro,
Brazilo.

MEMBRO-SUBTENANTO 1961

481. Johansson, F-ino E., Hedemora,
Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

144. Carstensen, S-ro Th., Ahrensböck,
145. Grundhoff, S-ro J., Wuppertal-
Barmen, 146. Jacobsthal, S-ro A.,
Rendsburg, 147. Knauss, S-ro W.,
Neu-Ulm, 148. Reinelt, Prof. D-ro,
Bonn, 149. Urban, S-ro W., Burten-
bach, 150. Wehrheim, D-ro H., Hildes-
heim, Germanujo; 151. Pastor-Zarrao-
nandia, S-ro A., Bilbao, Hispanujo;
152. Bonomi, S-ro P., Verona, 153. Bos-
carino, S-ro Adv. G.S., Ragusa, 154.
Perini, S-ro G., Belluno, Italujo; 155.
Kačarević, F-ino D., Beograd, 156.
Pešić, S-ro M., Beli Manastir, 157. Sal-
berg, S-ro E.E., Selce, Jugoslavio; 158.

Romano-Joly, S-ro M., Dolisie, Kongo;
159. Blokpoel, S-ro H. J., Nunspeet; 160.
Jung, S-ro T., Scheveningen, 161. Rav-
estein-Basters, S-ino J.M., Den Haag,
162. Woessink, S-ro E.J., Arnhem, Ne-
derland; 163. Bugge-Paulsen, S-ro R.,
Oslo, 164. Ringstad, S-ro G., Torp,
165. Skyberg, S-ro A., Oslo, 166. Støp-
Bowitz, S-ro C., Oslo, Norvegujo; 167.
Wiltshire, S-ro A.G., Auckland, Nov-
Zelando; 168. Oliveira, S-ro B.A. dos
Santos de, Lissabon, 169. Rego, S-ro
M. Lopes do, Lissabon, Portugalujo;
170. Hardick, S-ro N., Cape Town,
Sudafriko; 171. Ahlin, S-ro E.V., Sköv-
de, 172. Almen, S-ro P., Hällefors, 173.
Björklund, S-ro Fritz, Floda, 174.
Carlsson, F-ino M., Vaddöbacka, 175.
Hallgren, F-ino A.L., Stockholm, 176.
Lindberg, S-ro Torsten, Prässebo, 177.
Linnander, F-ino S., Stockholm, 178.
Lundgren, S-ro R., Uppsala, 179. Ols-
son, S-ro O., Lund, 180. Persson, S-ro
O., Trelleborg, Svedujo; 181. Grunig,
S-ino M., Bern, 182. Grutter, S-ino L.,
Samedan, Svisujo; 183. Ballard, D-ro
Fr. E., Reseda, 184. Becquet, S-ro C.A.,
New York, 185. Belinfante, S-ro D-ro
F.J., West Lafayette, 186. Doneis, S-ro
A.F., Pharr, 187. Doneis, S-ino M.,
Pharr, 188. Eisele, S-ro J., St. Louis,
189. Franke, S-ro Wm. J., Rensselaer,
190. Glenney, S-ro W.W., San Marino,
191. Parsons, S-ino L.M., San Mateo,
192. Simon, S-ro Werner, Memphis, 193.
Simpson, S-ro W.P., Harrisburg, 194.
Solzbacher, D-ro W., Washington,
195. Tobusch, S-ro, Chicago, Usono.
196. Perez, S-ro V., San Francisco,
Argentino; 197. Grahovac, S-ro I.,
Fitzroy, Aŭstralio; 198. Albuquerque,
S-ro D-ro J. J. de, Maceico; 199. Au-
gusto, S-ro O., Barra Mansa; 200.
Araujo, F-ino I. B. de, Rio de Janeiro;
201. Bondarovsky, S-ro E., Barra
Mansa; 202. Bondarovsky, S-ro S.; 203.
Gomes Braga, S-ro I., Rio de Janeiro;
204. Brass, S-ino H., Curitiba; 205.
Ferreira da Costa Filho, S-ro Fr., Rio
de Janeiro; 206. Coutinho, S-ro A. C.,
Rio de Janeiro; 207. Dionisio, S-ro
C. H., São Leopoldo; 208. Drucker, S-ro
G., Curitiba; 209. Franco, S-ro L. C.,
Recife; 210. Freitas, S-ro A. W. de,
Rio de Janeiro; 211. Knoedt, S-ro
L. H., Salvador; 212. Nunes, S-ro E. P.,
São Paulo; 213. Oliveira, S-ro L. J. de,
Santos; 214. Pádua, Gen. G., Belo
Horizonte; 215. Peccioli, S-ro I., Jaú;
216. Pinto, S-ro H. L., Alfenas; 217.
Pinto, S-ro J. D., Santo André; 218.
Przewdowski, S-ro R., São Leopoldo;
219. Rezende, D-ro C., Belo Horizonte;
220. Santos, S-ino Z. C., Teofilo Otoni;
221. Machado da Silva, S-ino I., Rio
de Janeiro.

FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato : 247 MA, 32 MJ, 7
J-MJ kaj 1 J-MA.

S-ro A. Wetterstein, Germanujo,
1 MA. S-ro E. Carlen, Svedujo, 2 MA.

Entute : 250 MA, 32 MJ, 7 J-MJ kaj
1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi espe-
rantistojn en nepagipovaj landoj,
honore al la nobla prezidinto de U.E.A.
(Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

FONDAJO DOMO

Es. Grupo Tailfingen, Germanujo,
50.— gld. Ges. J. J. Derks, Monako,
100.— gld. Klubo Groningen, 50.— gld.
L.E.E.N., 100.— gld. S-ino Woessink-
Boet, 100.— gld. S-ro W. Spaander,
50.— gld. F-ino K. Brouwer, 50.— gld.,
S-ro R. Slot, 50.— gld., ĉiuj Nederlan-
do. S-ro R. Bierhoff, Svislando, 50.—
gld.

Ĉiuj nomoj estas enskribitaj en la
"Ora Libro pri la Domo". Malavare
donacu por la propra sidejo de la
asocio !

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 18.710,10 gld.

S-ro Gründler, Germanujo, 8,97 gld.;
S-ro J. V. Holleman, Nederlando,
10.— gld.; S-ro J. E. Prins, Nederlan-
do, 5.— gld.

Entute : 18.734,07 gld.

Daŭrigu vian kontribuadon por sub-
teni la plian agadon de la Asocio, por
firmigi la poziciojn akiritajn dum la
Zamenhof-Jaro !

FONDAJO OFICEJA ILARO

S-ro Anders Persson, Svedujo, 6,25
gld.

DONACOJ AL A.P.O.

A. Wesser, Usono, 7,75 gld.

DONACO AL INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro D. B. Gregor, Britujo, 10.— gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

Direktorino C.O.

M. H. Vermaas,

ANONCETOJ

Letervespero. 3 Okt. '62 ĉe Leeds Es-
peranto-Asocio. Bonvolu sendi bild-
kartojn, leterojn. Certe respondos.
Daŭra korespondado laŭ interkonsen-
to. Skribu unue al : J. A. Briscoe, 57,
Primley Park Crescent, Leeds, 17,
Anglujo.

Kristanaj junuloj kaj alikredaj amikoj
bonvolu amase skribi al Esperanto-
Servo, H. Dito Goeres, Viersener Str.
255, Moench-Gladbach (Germanio
okc.), por korespondi kun evangeliana
junulgrupo (aĝo 16—20) de nia urbo.
Respondo garantiata.

La gefilatelitoj-geesperantistoj, ĉe la
filatela societo en Pazargik, Bulgario,
deziras prezenti pruvojn pri la forto
kaj la solidareco inter geesperantistoj
tutmonde, ankaŭ la taŭgecon de la
internacia lingvo Esperanto kiel hel-
pilo por reciproka interkompreniĝo
kaj interŝanĝo de diversaj Esperanta-
ĵoj kaj filatelaĵoj. Pro tio ni decidis
aranĝi Esperanto-filatelan ekspozicion.
Ni petas, bonvolu amase sendi al ni

NOVA ADRESO DE LA CENTRA OFICEJO :

NIEUWE BINNENWEG 176, ROTTERDAM-2

NOVA TELEFON-NUMERO : 3 27 88

konvenajn materialojn : filatele afrankitajn kovertojn, il.p.k., nacilingvajnajn Esperantajn filatelajn gazetojn, reklamojn, afiŝojn kaj aliajn Esperantaĵojn kaj filatelaĵojn, proponojn por interŝanĝo k.a. Helpu nin, ke ni aranĝu imponan ekspozicion. Vi nepre ricevos respondon aŭ egalvaloran rekompencan, laŭ via deziro. Ni ankaŭ deziras pritrakti la demandon "ĉu estas eble kaj necese krei, sub la patroneco de la U.E.A., internacian asocion de la Esperantistoj-Gefilatelitoj"? Adresu al: Ljubomir Levičarov (por ekspozicio) Pazarĝik. Strato Jurdan Nenov 11-A. Bulgario.

Bv. atenti! Ni havas novan adreson: "La Nesto", Asker. Herberth k. Pepita de Caspary.

20 Gelernantoj deziras korespondantojn e.ĉ.l. Skribu nomojn kaj adresojn per majuskloj al S-ro J. R. Douglas, 23, Larch Ave, Whitburn, Sunderland, Anglujo.

Kanadaj membroj de la asocio "Unuigintaj Nacioj" volas korespondi kun membroj de tia asocio eksterlande, aŭ kun personoj, kiuj ŝatus formi U.N.-grupon en sia lando. Skribu al "U.N.-Asocio, 422 Davis Drive, Newmarket, Ontario, Canada".

Katalogo pri porokazaj Esperantomarkoj aperos en marto. Reinhold Jensen, Sdr. Ringgade 77, Aarhus, Danlando. Prezo: 14 steloj aŭ 1 \$. Ne por pm.

Se vi metie servas en komerca televido aŭ reklamoficejo, korespondado kun vi min interesus. Reklamredaktoro, S-ro Harri Melasniemi, Itäinen katu 40 D 65, Turku, Finnlando.

Markolanoj! Se vi loĝas ene de vojaĝebla distanco de Bulonjo-ĉe-Mar, estas via morala devo partopreni Unuan Markolan (Kvarlandan) Kongreson, 12an-13a de majo. Se vi ne ricevis bultenojn, turnu vin al plej proksima UEA-delegito aŭ rekte al Norman H. Smith, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo, kiu ĉiukaze volonte aldonos al sia jam 500-adresa sliparo. Oni jam parolas pri denove laŭmoda Esperanto en Ostendo, Dunkerko, Kalezo, Bulonjo, Dovro kaj Folkstono. Nepre feriu en unu el tiuj gravaj internaciaj centroj.

Banurbo Teplice festos datrevenon de "1200-jara legenda eltrovo de varmfontoj 762-1962", nia Esperanto-klubo 55-jaran Esperanto-movadon en Teplice 1907-1962. Sendu jam nune gratuletojn kaj il. pk. por festvespero kaj ekspozicio 15.5.62! Ni deziras korespondadi. Certa respondo! Skribu al: Esperanto-Klubo ZK-ZBN, Lípová 2, Teplice. Ĉeĥoslovakio.

50-jara jubileo en Poznań — Pollando — Antaŭ 50 jaroj estis en Poznań fondita "Societo de polaj esperantistoj". La loka filio de PEA diversmaniere festos la jubileon. I.a. okazos en aprilo ekspozicio de esp. poŝt- kaj glumar-koj, il.p.k., afiŝoj k.s. en publika salonego. Alsendu salutkartojn kaj ĉian konvenan materialon. Ĉiu kontribuinto ricevos reciproke interesan memor-

foton speciale poŝtstampitan. — Pola Esperanto-Asocio, Dąbrowskiego 12, Poznań — Pollando.

Llangollen, Kimrujo: Ni intencas ĉeesti la internacian muzikan "Eisteddfod" en Julio, kaj ŝatus antaŭkon-takti aliajn, kiuj iros. Skribu al "Esperanto", 11 Shaftoe Crescent, Hexham, Northd, Anglujo.

Deziras seriozan korespondadon, nur per bildkartoj, F. Font Perxés- Str. Asturias, 7-3° Barcelona-12 Hispanujo.

Belan frontispicon havas "William Penn", majstra prelego de Prof. E. Privat pri paca pioniro, 4 rpk. aŭ steloj. Kvakera Esperantista Societo, 5 Cotham Park North, Bristol 6, Anglujo.

Por helpi disvastigi nian lingvon, sendu infandesegnaĵojn al la peranto de Migranta Ekspozicio — S-ro J. Montfort, Apartado 19.003, Barcelona, Hispanujo.

Grava hispana revuo pri modernaj konstruaĵoj deziras akiri fotojn kaj artikolojn pri nova arkitekturo. Rekompencos laŭdezire. Respondo garantiata. S-ro Johano Farré Sierra, Ronda General Mitre. 107, Barcelona 6, Hispanujo.

Ekslibris-Kolektantoj: Bonvolu registriĝi (kontraŭ alsendo de Via ekslibriso) por la eldonota esperantista kolektantlisto tutmonda kaj eventuala faka societo. Nicolai Liventhal, fakdelegito, Vester Søgade 50, I, Kopenhago V., Danlando.

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiutage	15.30-16.00	Malongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso. Warszawa, 249m. (1205 kcs), 48.43m., 42.11m., 41.99m., 41.12m., 31.50m., 31.45m., 31.01m. P. Esperantaj disaŭ- digoj, Pola Radio, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	10.50-11.00	Natal, 236m. (1270 kcs), 60.79m. K. Radio Potí, Av. Deodoro 245. Natal, Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 48.62m., 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 30.93m., 25.32m. P.
	23.40-24.00	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo.
	23.45-24.00	Rio de Janeiro, 441m. (680 kcs), 92.90m., 60.30m. K.I. Radio Copacabana ZYP 20/27, Avenida Rio Branco 277-17, Rio de Janeiro, Brazilo.
Lundo	12.20-12.30	Bern, 48.66m, 31.46m., 16.86m., P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	17.00-17.15	Valencia, 193m. (1379 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.55	Hilversum, 402m. (746 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	16.40-16.50	Wien. 513m. (594 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30 a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	12.20-12.30	Bern. Kiel lunde (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.15	Guatemala, 470m. (640 kcs), 48.54m., 30.98 m. I.K. Radio Nacional T.G.W., Guatemala Cd, Mezameriko.
Ĵaŭdo	06.00-06.15	Gdansk, 230m. (1303 kcs). I.K. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk-Wrzeszcz, Pollando.
	08.35-08.45	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto- Office, Orleans (Loiret), Francujo.
	21.15-21.25	Bern, 48.66m., 31.46m., 25.61m., 19.60m. P. (D-ro Baur).
	22.05-22.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.00-22.10	Hilversum 298m. (1007 kcs). V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m, 30.71m, 25.10m, 16.78m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaude. (D-ro Privat).
	22.00-22.30	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Erasmo Braga 118, Rio de Janeiro, Brazilo.

Radio Roma. 3-IV, La plej granda kino-urbo apud Romo; 6-IV, La itala poeto G. Pascoli; 10-IV, Tra la literaturo; 13-IV, Leterkesto kaj bibliografio; 17-IV, Novaĵoj el Italujo; 20-IV, La triakta paska dramo; 24-IV, Italaj kanzonoj en Esperanto; 27-IV, Italujo kaj fremda verkisto Chateaubriand. Krome, ĉiun merkredon. kuriero de Esperanto.

La nova Esperanto-bulteno **ilustrita**, "Naturista Vivo", pritraktas la Nudismon kaj aliajn naturistajn temojn; novaĵoj de la naturista movado en tut-mondo, adresoj de kluboj, revuoj, k.t.p.

La ilustrita "Naturista Vivo" estas SENPAGA al ĉiuj membroj de la "Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista" (INFE, fondita en 1960). La membroj havas membrokartojn kaj rajtas senpage anonci en "N.V."

DUMVIVA membreco en INFE (inkluzive dumvivan ricevadon de "Naturista Vivo") kostas NUN nur 75 Stelojn (por familio aŭ sola viro; sola virino pagas nur 38 Stelojn) aŭ egalvaloron en monbiletoj de iu ajn lando, poŝtmandatoj, int. rpk., k.a.

VI NENION PLI PAGOS! SED AGU TUJ!! — baldaŭ la kotizoj plialtiĝos.

„NATURISTA VIVO”,

Leif Heilberg, 1801 Page Street, San Francisco 17, California, USONO.

INFE bone progresas; hodiaŭ ni jam havas 110 aliĝintajn membrojn — pere de 57 aliĝiloj!

Nova periodaĵo „NOVA MONDO”

Oni intencas eldoni periodaĵon pritraktantan diversajn idealismojn, i.a. vegetarismon, laŭnaturecan terkulturadon, korpan kulturon, mondcivitanismon, esperantismon, kolektivismon, spiritualismon, sendogman kristanismon, kaj parencajn ismojn. Kunlaborantoj (verkantoj kaj tradukantoj) estas dezirataj. — Unua celo: eldoni provnumeron ĉi-jare. Interesuloj mendu la provnumeron kiel eble plej baldaŭ por ke oni sciu la nombron pretigendan. — Samtempe oni sendu 2 sv. kr. aŭ egalvaloron por la provnumero. — Se ne estos eble eldoni la provnumeron, la mono estos uzata por prepara laboro por projektita vegetara kolektivo en Eŭropo.

Adreso : **Gunnar Rugland**

**ĉe Rönnell, Hornsgatan 89 II
STOCKHOLM Sv., Svedujo.**

Grava anonco al pacamantoj, vivreformuloj

Personoj (partoprenantoj/subtenantoj) kiuj interesiĝas pri fondo de pacigaj kolektivoj por vivreformuloj (vegetaranoj k.t.p.), kiel pacfaktoraraj centroj (nun ege bezonataj) bonvolu sin turni al **Gunnar Rugland, ĉe Rönnell, Hornsgatan 89 II, STOCKHOLM Sv., Svedujo.**

(La unua centro estu ie en Eŭropo, je iu grandbieno, kastelo aŭ simile).

Helsingör

loko de la Antaŭkongreso 29/7 — 4/8 kaj de la FERIAJ KURSOJ. Prelegoj, distrado kaj ekskursoj. La internacia Altlernejo estas la antaŭkongresejo. Senpage ni sendos al vi nian programon kaj invitas vin plej kore.


**L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.**

„Metu en valizon la Kongresĉemizon”

jen iama konsilo de RAYMOND SCHWARZ, ĉiujare plenumita de kelkmiloj da esperantistoj.

Antaŭ ol vi povos ĉijare tion fari, vi rapide aliĝu al la 47-a U.K.

KOPENHAGO ATENDAS VIN



"Mi tre ĝojas, ke vi sukcesis pliriĉigi nian neabundan fakan literaturon per ankoraŭ unu valora popularscienca libro, kaj mi kore vin gratulas pro ĝia bonkvalita enhavo. Ĝi estas tute distra legaĵo, ĝuste el la speco, kiun ni tiel ege bezonas."
(D-ro Paul Neergaard (Kopenhago) en letero sendita al la reverkinto la 4.1.1961.)

Eldoninto en okcidento : U.E.A.

Prezo :
5.— gld.,
20 steloj

Moderna lernolibro de Esperanto

POR LA TUTA MONDO

Natura metodo por memlernantoj kaj por kursoj
— nur mallonga enkonduko nacilingve — ĉio cetera
en Esperanto kaj per ĉarmaj ilustraĵoj

Vilho Setälä :

Privilegia Vojo

al lingvoscio : Esperanto

Kun instrukcio en A, Da, F, G, H, Ne, No k.a.
lingvoj, laŭ elekto de la mendanto

Prezo 12 steloj + sendkosto

• Kuneldoninto : U.E.A.

D-ro F. Szilágyi : "Mirinde logika konstruo."
F. Faulhaber : "La aventuroj de Keko kaj Riko
estas vere originalaj, komikaj rakontoj, kiuj
streĉas la atenton de eĉ plenaĝuloj".

J. R. G. Isbrucker, prez. de la Akademio : "Se mi
ne jam sciis Esperanton, mi certe ŝatus lerni ĝin
per tia libro".

Mendu ĉe U.E.A.

MALSATA ŜTONO

de RABINDRANATH TAGORE

Tradukis el la bengala lingvo L. Sinha.
Ilustraĵoj de Sukhamoy Mitra.

La sep rakontoj kondukas la leganton en
veran hindan atmosferon, foje fean kaj
fantazian, kun la nebulaj pentraĵoj de
revo kaj sonĝo, foje realecan, kun la
premo de la lando kaj de la klimato (la
pluvsezono, la riveroj), kun la peno de la
homoj, la laboro de la vilaĝanoj, la
fremdeco de la kastoĵ. (El recenzo en
Heroldo).

La verko estas libro n-ro 1 en la Serio
Oriento-Okcidento sub aŭspicioj de UEA.

Eldonita de

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Prezo : broŝ. gld. 8.50, bind. gld. 11.50.
Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.

INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Belega fotolibro kun teksto en Esperanto.
Eldonis **BRUNA**, Nederlando.

Sur kvin konti-
nentoj infanoj
estas ĉarmegaj en
siaj ĝojo,
ĉagreno, ludo
kaj laboro
Konvinkiĝu
mem !

Prezo :
2,95 gld.
(11.80 steloj)

**MENDU ĈE
U.E.A.**

